6-a Jaro. N-o 267 APERAS  SEMAJNE 14. Novembro 1929

ESPERANTO JE LA SERVO DE L' TUTMONDA PROLETARO

SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA

KULTURA KAJ INTERHELPA ORGANIZO DE PROLET-ESPERANTISTOJ

REDAKTEJO: 14, avenue de Corbéra, Paris-12e
Gvidanto: E. Lanti

SIDEJO de Plenum-Komitato de SAT
23, rue Boyer, Paris-20e

ADMINISTREJO: Kolmstr. 1, Leipzig O 27
Administranto: R. Lerhner

Resumoj el la libro "Standards" (Normoj)

En antaŭaj n-oj ni informis nian Legantaron pri la enketo de s-o Filip, rilate al vivo kaj laborkondiĉoj de l' usona laboristaro. Poste ni sekvigis traktaĵon pri strukturo kaj batalmetodoj de IWW (Industriaj Laboristoj de la Mondo), revolucia laborista organizo en Usono. Hodiaŭ ni daŭrigas la informadon pri la nuna Usono, per resumo de K-do Ĵief pri la verko de franca laboristo-verkisto Dübreŭj (france: Dubreuil), "Standards", kiu aperis antaŭ nelonge (v. "S-ulo"n, n-on 256, p. 500). Prenante sur sin la taskon prezenti ekstrakte la enketrezultojn de Dübreŭj, tio ne signifas, ke nia kunlaboranto ĉiurilate samopinias kun la aŭtoro. Red.

Alvojaĝo

Dübreŭj vojaĝis al Usono por tie studi la industri-metodojn kaj la laboristajn viv-kondiĉojn. Dum dekkvin monatoj li laboris en tre diversaj fabrikoj, precipe kiel mekanikisto en metalurgio. Unufoje li dungiĝis ĉe Dennison, paperartikla fabriko, kaj plurfoje, por observadi helplaboristan vivon, li dungiĝis kiel ne-faklaboristo ĉe la "ĉeno" por la tielnomata "ĉen-laboro"*[1].

Li mencias, kiom severa la usona konsulejo en Francio enketis pri li, demandis lin, ekzamenigis lin per kuracisto, antaŭ ol konsenti doni al li, laboristo, pasporton por vojaĝi Usonon. Eĉ post tiuj timigaj enketoj, kelkaj almigrantoj kun pasporto ne ricevas permeson eniri Usonon, estas devigataj resti sur ŝipo en Novjorka haveno kaj returni Eŭropon, ŝlositaj en ŝipkajuto dum ŝiphaltoj en usonaj kaj anglaj havenoj, por ke ili ne forkuru.

Kiam fine vi ricevis permeson de l' usona polico eniri Usonon, tiam vi estas tute libera en la 9 milionoj da kvadratkilometroj. Vi ne bezonas viziti konsulejon, vi rajtas ŝanĝi vian nomon per simpla deklaro oficiala; la tuta lando estas por vi malfermita: nur atentu, ne malfermigi por vi malliberejon.

Vi estas libera obei al Reĝo Dolaro.

Loĝejoj kaj loĝantoj

Dübreŭj pensione vivis ĉe familio el gelaboristoj, ne en hoteloj kiel la plimulto da burĝaj enketantoj: hoteloj por li estis tro karaj. Li observis ĉe usonaj laboristoj grandan ne-kleron, speciale pri historio kaj civilizo en landoj neusonaj, pri geografio de landoj neusonaj, kaj tial trovis ilin tre patriotaj kaj naivaj.

Li mem, franca patrioto, ekĝojis renkontante (en Masaĉusets) usonanojn francdevenajn, kiuj ankoraŭ parolis iom franclingve. Multaj el ili miksis anglan lingvon kun siaj memorrestoj pri franclingvo, kiu estis grandparte regiona, speciale normanda lingvo de l' 18-a jarcento. Ofte li devis klarigi angle francan vorton, sed li malgraŭ tio tre ĝojis trovi tiajn "francojn", kaj aŭdi de ili: "Antaŭe la tuta lando ĝis la Pacifika oceano, ĝis Frisko (San Francisko), estis nia", do, franca ...

Li ankaŭ patriote speciale interfratiĝis kun poloj kaj ĉeĥoslovakoj, ĉar "historie fratoj" ... li skribas.

Tamen li notas, ke usonanoj bonege kunfandiĝis en unu popolon, ke tiuj forkurintaj mizeraj eŭropanoj, ofte tute senkleraj forrifuĝintoj el troloĝataj Italio aŭ Balkanio, konsideras Usonon kiel paradizon, kaj ankoraŭ ĉiam pli akiras konvinkon al si, ke nur tie oni inventas kaj posedas maŝinojn, manĝon sufiĉan, vestaĵojn, "liberon" ...

Dübreŭj notas la emegon de l' usonanoj iri okcidenten, kiun li mem sentis. (La Pacifika marbordo distingiĝas per la plej agrabla klimato. Plej belaj kaj riĉajn grundojn enhavantaj montaroj, lignoriĉaj, estas en okcidenta Usono.) — Heroo de l' usonanoj, ĉe la popolo, pli ol la aristokrata Uaŝint'n (Washington), estas Linkoln (Lincoln), kiu batalis pro liberigo de la negroj, kiu vivis inter la popolo. La plej konata bildo en Usono prezentas Linkoln sidanta ĉe pionira fajro en arbarkabano kaj leganta. Ĉirkaŭ kelkaj ideoj simplaj kiel tiu bildo, ĉiuj usonanoj, eĉ kiuj dum juneco almigris, fariĝas sufiĉe samaj, memfidaj, ĉar sataj. Superstiĉo de raso en ili kreskas: ili nomas muloj la kanadanojn, ĉar tiuj francdevenaj almigrintoj miksiĝis kun indiĝenaj rasoj, anstataŭ mortigi ilin, kiel kristane faris la blondaj anglo-saksoj, kun Biblio en la poŝo, la plej supera raso en mondo, kiel ĉiuj scias. Eks-anglaj usonanoj nur akceptis blankhaŭtajn virinojn.

Ni esperu, ke Usono ne tro longe restos la hejmo de la plej ridindaj kaj teruraj eŭropaj superstiĉoj, kiel Biblio, blondrasa supereco, antikvaj mezursistemoj (nur en mono ili akceptis la decimalan sistemon), ŝato de militismo kaj neceso fini filmon per kiso.

Tiom da industria potenco, kaj dense apude, tiom da spirita malforto, fariĝas tro danĝeraj kunigataj, sed ankaŭ neverŝajnaj. Spirito naskiĝos. Spirito ne povas ne naskiĝi inter tiom da laboro, bonhumoro kaj bonintenco.

Dungiĝoj

Dübreŭj nomis sian libron "Standards", kio signifas: "Normigo, tipigo", ĉar evidente la labor-raciigo, la apliko de l' Teloraj metodoj en la laborprocedo aperis al li plej karakteriza kaj plej grava fenomeno en la usona vivo.

Oni malpli demandas en Usono: "Kie vi laboris? Kion vi faris?" Kontraŭe, ĉeflaboristoj kutimas diri: "Nu, vi eklaboru, ni vidos, kion vi scipovas produkti."

En Usono, hejmo de la labordivido (Telor-sistemo), la mekanikistoj devas

---

* Tipigoj de l' laborprocedo laŭ la Teloraj metodoj raciigaj.

[1] K-doj ĉiulingvaj bonvolu respondi al ni, ĉu por ili estas komprenebla k ĉu al ili ŝajnas trafa tiu esprimo. Ni scias, ke franc- kaj germanlingvanoj povas kompreni tiun terminon ... sed ĉu ankaŭ K-doj alilingvanoj? — Red.

INTELEKTULO? — MANLABORISTO?

—Mi havas grandan admiron por Zamenhof: li ja kreis lingvon, kiu sukcesis trabati al si vojon k akiri vivkapablon. Sed tiu sukceso rezultas ĉefe el tio, ke esperanto kelkrilate tre similas "naturajn", naciajn lingvojn. Kaj oni bedaŭras iafoje tian similon.

La naciaj lingvoj trenaĉas kun si tiom da metafizikaĵo, tiom da nelogikaĵo, da erarigaĵo, ke mi ofte sopiris al esprimilo, per kiu oni povus meti en vortojn nur tion, kio rilatas al faktoj aŭ al ia tute preciza koncepto. Oni dezirus havi lingvon, kiu malebligus ĉian miskomprenon, oni sentas simpation por ia filozofia a p r i o r i a lingvo, kian revis jam de longe utopiistoj...

—Ne metafizikumu viavice; parolu pli konkrete; vi citu ekzemplojn...

—Nu, volonte; mi provu. Se mi parolas pri "manlaboristo", kion precize tio signifas? Meblisto, seruristo, tajloro ktp. estas nomitaj "manlaboristoj"; ĉu tio signifas, ke ilia cerbo ne utilas al ili dum ilia laboro? Se estas tiel, mi protestas. Mi mem estas "manlaboristo" — aŭ almenaŭ estis — k mi asertas, ke dum la metia laboro, mia penskapablo ne malofte estis streĉata por solvi diversajn problemojn, kiuj stariĝis antaŭ mi, ĉiufoje, kiam temis pri konstruo de nova objekto, aŭ pri eltrovo de metodo aŭ de procedoj, kiuj plirapidigos mian laboron. Mi certigas, ke iafoje mi streĉis pli forte mian intelekton ol kiam mi verkas artikolon. Tamen, vidante min ĉe skribotablo k sciante, ke mi skribas por gazeto, multiuj nomus min "intelektulo", dum ili nomus min "manlaboristo", kiam mi staris ĉe stablo en meblofabriko.

Kion sekve signifas la terminoj i n t e l e k t u l o, m a n l a b o r i s t o?

Min despli embarasas la demando, ke hieraŭ mi renkontis surstrate malnovan konaton, kies okupo estas frotpurigi la pargetojn de bonhavuloj per brosoj ligitaj ĉe liaj piedoj. Mi bone prezentas al mi tiun laboron k se mi nomus mian konaton "piedlaboristo", neniu tamen komprenus. Sed tiu homo estas certe enkalkulata en la kategorio de "manlaboristoj", kvankam li laboras ĉefe per la piedoj.

Kaj se mi pensas pri tiu lerta, fama kirurgo, kiu segas ostojn, tranĉas karnon, ligas tendenojn, kudras haŭton k iel aspektas kiel buĉisto, mi tamen ne povas nomi lin "manlaboristo". Se tiel mi parolus, tio aspektus kiel malsprita ŝerco. La lerto de la manoj ludas tamen ĉe kirurgo grandan rolon ĉe operacio!...

Kaj ĉu mi devas nomi "intelektulo" tiun senoriginalan aŭtoron, kies nura talento estas scipovi kolekti k kompili dokumentojn, kunfliki argumentojn troviitajn ĉi tie k tie?

Ĉu estas "intelektulo" tiu instruisto, tiu profesoro, kiuj kvazaŭ vomas al siaj lernantoj la instruon, la sciencon, kiun ili englutis el libroj k malbone digestis?

Kiel vi vidas, oni kelkfoje povas trafi en grandan embarason, kiam oni celas malkovri, kion kaŝas la ŝelo de vortoj.

Plej ofte ĉio estas nur ŝajno k trompo. Oni nomas ordinare "intelektulo" homon, kies manoj estas puraj k senkalaj, kiu surhavas blankan kolumon k bone ordigitajn vestojn. Tamen se oni povus rigardi en la kranion de multaj tiaj elegantuloj, oni vidus, ke tie kuŝas inerte nur ideoj ĉerpitaj el gazetoj aŭ libroj. Ilia intelekto ludas proksimume la rolon de la stomako ĉe ansero, kiun oni grasigas; ĝi senkritike akceptas la pensan nutron k "grasiĝas".

Sed en laborejo jen homo vestita per makulita kitelo; li kutimas cerbumi pri perfektigo de siaj iloj, pri eltrovo de novaj laborprocedoj; li plie en sia vivo akceptas kiel vera nur, kion li bone perceptas aŭ klare komprenas; homo, kiu ne timas diri: "mi ne scias", kiu kapablas dubi; unuvorte homo, eble ne klera laŭ la kutima senco de l' vorto, sed kies intelekto ĉiam vigle funkcias. Nu, se mi nomus lin "intelektulo", povus esti, ke li mem ofendiĝus, opiniante esti mokata: Li ja estas "manlaboristo", tial ke lia laboro malpurigas k kalumas liajn manojn.

—Sed viaj rimarkoj ne tre utilas. Diru prefere, kiel vi deziras, ke oni difinu la vortojn i n t e l e k t u l o k m a n l a b o r i s t o.

—Ankaŭ mia respondo al via demando tute ne utilos, ĉar mian difinon neniu vortaristo povus akcepti. Sed, por kontentigi vin, jen aŭskultu:

Intelektulo oni devus nomi nur homon, kiu en sia metio, en sia fako eltrovis ion novan; homon, kiu ĝenerale en sia vivo kapablas liberigi sin de la rutino, de la tradicio, de la kutimoj, kiujn li opinias maltrafaj; perfekta intelektulo estas — k r e a n t o.

Tipa intelektulo estis Zamenhof — almenaŭ ekster sia fako, la kuracarto. Kvankam ne estante fakulo en lingvoscienco, li tamen kreis[1] esperanton — dum centoj da sciencoriĉaj filologoj k lingvistoj amasigis plej lertajn k konvinkajn argumentojn por "pruvi", ke artefarita lingvo estas utopia entrepreno, ke tia kreaĵo povas nur iel simili la H o m u n c u l u s - on de d-ro Faŭsto.

Intelektulo estas mia najbaro, tiu ĉarpentisto, kiu inventis elipsilon, kvankam li neniam faris tre profundajn geometriajn studojn.

Multe da similaj ekzemploj mi povus citi. Ne utilus.

Mi parolu al vi pli radikale: oni devas klopodi forigi el la vortaroj tiujn du maltrafajn terminojn: i n t e l e k t u l o, m a n l a b o r i s t o. Kaj tio estos ebla nur, kiam ne plu ekzistos sociklasoj. La manlaboristo ja estas la posteulo de la antikva sklavo, de la mezepoka servutulo. Kaj ĉiu scias, ke inter la antikvaj sklavoj estis ankaŭ homoj kun forta intelekto; mi citu, ekzemple, la fabliston Ezopo.

Oni devas celi, ke la homoj estu samtempe intelektuloj k manlaboruloj. Normala homo devas malvolvi ĉiujn siajn kapablojn. Malklera laboristo estas sendube ridinda en kelkaj okazoj. Sed ne malpli ridinde aspektas tiu scienculo, kiu ne scipovas enigi najlon en tabulon, ne frapante al si sur la fingrojn per la martelo.

Ĉiu homo devus labori per la manoj dum kelka tempo ĉiutage; ĉiu homo devus havi la eblon malvolvi sian intelektan kapablon al ĉiuj direktoj. Intelektuloj, manlaboristoj, laŭ la ĝenerala akcepto de l' vortoj, estas iaj monstroj produktitaj per la ekspluatado de homoj kontraŭ aliajn homojn. E. L a n t i.

[1] Jen denove vorto miskompreniga: Krei ja povas signifi fari ion el nenio. Tio estas ja sensencaĵo, kiu akcepti povas nur dikredulo. Oni devas kompreni ĉi tie la vorton krei en la senco: fari ion apartenontan al neniu ekzistanta speco, stilo, tekniko k. s. E. L.

---

ankoraŭ fari mem la tutan laboron ĝis finpretigo de iu maŝin-ero. Tiu laboro, en Eŭropo, estas plenumata de diversaj laboristoj: tornisto kaj muntisto, minimume. Jen unu el tiuj kontraŭdiroj, kiuj en Usono estas pli grandaj, en la sama urbo, ol en Eŭropo. Por finpretigi mem sian eron, la mekanikisto bezonas uzi tornobenkon, bormaŝinon, frez-maŝinon ktp. Li trovus ofte okupita la maŝinon, kiun li bezonas, se ne, preskaŭ ĉiam, en usonaj mekanik-laborejoj, la abundo da grandaj kaj etaj iloj tute forigus tiun mankon.

La dungito ricevas tuj tualeto-tukon kaj sapon. Varma kaj malvarma akvo en laborejo permesas ĉie bonan sinlavon. Tagmezajn "paŝtojn"[1] Dübreŭj preskaŭ ĉie trovis en laboreja manĝejo, ne pli karaj aŭ eĉ iom malpli karaj ol en restoracioj.

Duonhoron la laboristoj libertempas por tagmanĝi. Rapidege, ne-bele, kiel sen plezuro ili manĝas, ne parolante, ne ŝercante. Junuloj post dek minutoj forkuras por ludi ankoraŭ "bes-bol"-batalon[1] antaŭ "punktado" (kontrolmarkado) je laborej-eniro, kiu devas okazi dek minutojn antaŭ la eklaboro, ĉar ĉe laborkomenca tempo ĉiu devas stari ĉe sia laborloko.

Dübreŭj, malnova franco, ne ŝatas sporton, kaj kulpigas la sporton pri neklero, spiritmalforto de l' usona junularo, — de ĉiuj junularoj en la mondo.

Kvin minutojn antaŭ laborfino sonoras signalo por permeso lavi sin.

(Daŭrigota.) J i e f.

[1] Preparita manĝo-porcio.

[1] Angle: "base-ball", plej ŝatata en Usono pilkludo.

Proverbaro Esperanta

laŭ la verko "Frazeologio rusa-pola-franca-germana" de *M. F. Zamenhof,* aranĝis *L. L. Zamenhof.*

Unu volumo in-8, 82-paĝa

Prezo: 1,50 mk. g.

Adm. de SAT.

Okaze de princa gefianciĝo

Belgio kaj Italio plene ĝojas. La kronprinco Umberto, ido de l' senpotenca reĝo de Italio, fianĉiĝis kun la belga princino Marie-José.

La gefianĉiĝo de l' princa paro, plurfoje anoncita kaj malordonita, finfine oficialiĝis. La alveno de l' reĝido okazis inkognite. Por la eminentuloj, kiuj estis komisiitaj bonakcepti lin, "inkognita vojaĝo" estis nur ruzo por eksciti la malsanan vidamon de l' "strathomoj". Nuntempe ankoraŭ, por havigi al si popularecon, la regantoj ĉiam zorgas organizi belegajn, pompajn manifestaciojn, paradojn aŭ vizitojn.

Depost la milito la tombo de l' Nekonata Soldato en Bruselo estas la celo de ĉiuj manifestaciantaj komercistoj, etburĝoj, faŝistoj, de eminentaj urbvizitantoj. Ĝi ankaŭ estis tia de l' princo Umberto, kiu kiel aliaj similaj tombvizitintaj eminentuloj metis sur la funebran ŝtonon la jam tradician florkronon.

Aro da ĉiamaj stultaj rigardemuloj, gardataj kiel ŝafaro per bariloj el blankkaskaj policanoj kaj arogantaj ĝendarmoj, plenigis kun belgaj kaj italaj oficialuloj, vestaĉitaj per siaj emblemoj el la ŝranko tiritaj por tiu okazo, la placon, kiam la famega fianĉo profanis la tombon de l' nekonata militviktimo.

Pafo interrompis la ceremonion, homo provis, sensukcese, mortigi la princon. La pafinto estis sovaĝe batata kaj kondukata al malliberejo. Italo kaj detektivo, kiuj apud li staris, spertis la saman sorton per la frenezigitaj policanoj. La pafinto, Fernando De Rosa, estas 21-jara rifuĝinta italo, studento en Sorbon' (Sorbonne) en Parizo kaj propagandisto de l'maksimalista socialista partio (itala). "Mi agis pro konscienca intereso", li deklaris al la juĝesplorintoj.

Ne temas ĉi tie pravigi aŭ ne lian agon, diskuti, ĉu la individua atenco povus liberigi la italan popolon el la faŝista tiraneco. Sed gravaj estas por la kontraŭfaŝistoj loĝantaj en Belgio kaj la belga popolo la okazintaĵoj de l' 24. oktobro.

Faŝista policaro regas en Belgio

Multaj italaj malamikoj de l' karnavala Cezaro estas minacataj de l' ellandiĝo. Post enkarcerigo de De Rosa sekvantan tagon 31 italoj estis arestataj. La italaj laboristoj konsistigas gravan kontingenton el manlaboristoj en Belgio. Kiel post pluvo kreskas fungoj, tiuj enmigrintoj, tuj post sia alveno, estas enkadrigataj de italaj policistoj, kiuj laŭcirkonstance titoliĝas teknikistoj, ĉeflaboristoj ktp. Tiuj fiuloj estas komisiitaj informi la belgian policon pri la agado de l' italaj salajruloj. Krom tiu laboro ili plie provokas siajn samlandanojn, kiuj rifuzas amegi Musolini'n. Fame konata en Belgio estis Ĝiakomo Garibaldi, polic-denuncisto. La stabo de tiuj "delegitoj" estas la ambasadorejo en Bruselo. Tiujn faktojn konfirmis la okazintaĵoj de l' 24. oktobro. La detektivo Mazza, komisiita ŝirmi la princon dum sia vojaĝo, ĉeestis ĉiun juĝan esploron, kiel li mem deklaris al burĝaj ĵurnalistoj. Aliparte la Milana prefekto petas informojn pri la afero, kaj la alveno de l' policestro de Balozzi estas anoncita. Unuafoje eksterlandaj policanoj partoprenas juĝan enketon.

Politikaj konsekvencoj

La pariĝo de l' geprincoj belga kaj itala havas kiel ĉiuj reĝaj geedziĝoj politikajn kialojn. Laŭ grava burĝa gazeto ĝi estus la okazo por Belgio partopreni la starigotan latinan unuiĝon, kompense je la anglosaksa k rusa unuiĝoj. Estas konate, ke Belgio ekonomie dependas de siaj najbaroj, armee de Francio, nun police ĝi ricevas ordonojn el Romo: la Cezaro de Karnavalo estas la policestro de Belgio. Kaj venontjare ĝi festos sian centjaran sendependon!

A. V. G. (8100).

LA PROJEKTO DE L' TRANSSAHARA FERVOJO

Por la kapitalismo la konstruado de granda transsahara fervojo estas konsiderinda ĉefe el du vidpunktoj: la ekonomia kaj la militista. Nin povas interesi en tiu projekto nur la giganta teknika plenumo, kaj la fina rezulto de tiu efektivigo: la plimalgrandigo de l' spacoj teraj per kreo de rapidaj kaj senperaj komunikiloj, la plifaciligo de l' homaj interrilatoj.

Ni vidu, al kiaj konsideroj submetas kaj kiel taksas la projekton en ĝiaj detaloj la kapitalistaj efektivigontoj. Ili demandis sin unue, ĉu tiu fervojo entute estus vivpova. Ĝi trapasus dezertegon kaj trovus nenion por transporti: ĝi sekve ne kovrus siajn konstru-kostojn, eble ne eĉ siajn kostojn de ekspluato. Oni respondas, ke aliaj fervojoj trapasantaj dezertajn regionojn egaligas siajn spezojn. Kaj oni citas la transkaspian fervojon, la transaŭstralian, kies trapasata spaco en plene dezerta lando estas proksimume la sama, kiel tiu antaŭvidita por la transsahara, nome 1900 km., kaj eĉ la transsiberian, kiu povas esti komparata, sur iuj punktoj de ĝia trapasejo, kun dezert-fervojo.

Oni atentigas, ke ne multe gravas, ke la transsahara fervojo ne povos envagonigi ŝarĝojn dum la veturo: la esenca afero estas, ke ĝi interligu loĝatajn regionojn, kiuj ambaŭ disponas pri interŝanĝ-varoj. Tio estas fakto, ĉar ĝi kunligus Nordan Afrikon kun la Supra Volta kaj kun Sudano, tio signifas, kun teritorioj loĝataj de respektive 15 kaj 13 milionoj da loĝantoj kaj gardantaj ambaŭ multnombrajn riĉojn ankoraŭ ne ekspluatitajn.

La konstruado de 2000-kilometra fervojo al "Far West"[1] permesis al tiu ĉi regiono intensigi la grenkulturon kaj vendi ĝin je malkara prezo sur la mondmerkato. Sen la fervojo la greno de l' "Far West" ne ekzistus. La samo okazus rilate al la transsahara fervojo: ĝi signifus malkaran transporton. Nu, fakto, kiu ŝajnas paradoksa, sed kiu klariĝas, — la transportkostoj sur tradezerta fervojo estus malpli altaj ol sur ĉiu alia: envagonigante sur unu ekstremaĵo kaj malŝarĝante sur la alia, sen peraj manipuloj, la fervojo ekspluatas en la plej bonaj kondiĉoj: en tiuj de l' ŝipegoj, kiuj transiras la oceanon de unu haveno al la alia.

Ne estas certe cetere, ke la Saharo estas tiel malriĉa dezerto, kiel oni kredas: oni konas la karbon de Kenadza, la manganon de Figuig, la ŝtonsalon de Taodeni; la grundo neesplorita ankoraŭ enfermas verŝajne mineralojn: eble kupron, kiel en Maroko, kaj fosforaĵojn kiel en Tunizio.

Estas verŝajne, ke la kreo de la linio, alportante al esence fruktodonaj regionoj la eblon trovi la disvendiĝon de iliaj produktoj (Sudano, kaj speciale la Niĝera Kurbiĝo estas veraj grenejoj) estigus gravan interŝanĝon de varoj kaj vojaĝistoj. La eblo ĝin plilongigi transen ĝis la koro de Afriko trans la Ĉad kaj unuigi ĝin kun la fervoja reto de l' Belga Kongo, estus nova elemento de prospero. Eble ni vidos post kelkaj jardekoj, kiam la tunelo sub la Maniko (fr: Manche) kaj la tunelo sub la markolo de Gibraltaro realiĝas, Londonon kunligita per fervojo kun Kap-urbo?

Aldonu ni plie, ke la Transsahara fervojo kunliganta regionojn de diversa produktado igas antaŭvidi konsiderindan trafikon. Ĝi estus la unua granda fervojo tradezerta orientata de nordo al sudo, dum la aliaj iras de l' oriento al okcidento, kunligantaj regionojn samproduktantajn.

Teknikaj malfaciloj kompreneble stariĝas. La unua estas la sablo. Kiel starigi fervojon sur moviĝanta grundo? Sed ni rimarkigu, ke la geografiaj konoj de l' plejmulto inter ni estas malĝustaj. La dezerto ne konsistiĝas en sia plej granda parto el sablo, sed el malmola grundo, la "hamada". La diversaj linioj desegnitaj klopodis eviti la sabloregionojn, kaj ili ankaŭ sukcesis en tio. La linio povus esti konstruata preskaŭ sen artefaritaĵoj (la plej grava sendube estus la konstruonda ponto trans Nigeron). La nivel-diferencoj estas sensignifaj, do nenia deklivo, preskaŭ plata profilo; malmulte da terlaboroj farotaj. Tiel bone ke oni esperas tre ĝustan komercvagonaran rapidon de 50 ĝis 60 kilometroj pohore, kun la normala relvojo.

La akvo-demando ŝajnas pli malfacile solvebla, kvankam ĝi nur havas signifon por la suda parto. Oni estos devigata alkonduki per kanaloj akvon de l' Niĝero. Cetere ankaŭ pluvas sur la montoj de l' dezerto; krom la konataj akvoprovizejoj oni povos eluzi ankaŭ subterajn tavolojn (ofte salecajn, vere). La transaŭstralia fervojo efektivigis en sia dezerta parto jam la akvo-alkondukon per kanaloj. Oni fine ankaŭ havas aliajn rimedojn por mildigi la malfacilojn, en akvo-liverado, kiel uzon de lokomotivoj kun turbino, kiuj bezonas malmulte da akvo, uzon de maŝinoj hejtataj per vegetaĵa oleo, kiun produktas grandkvante la Sudano.

Oni antaŭvidas la eblon, komencante la laborojn en kvar konstruejoj, ĝin plenumi dum ses aŭ ok jaroj. Oni kalkulas tiel progresi jare je 400 km, utiligante 4- ĝis 5000 laboristojn. Ne necesas diri,

[1] Angle; signifas: "Malproksima Okcidento" (de Usono).

ke tiuj laboristoj antaŭe jam estas elektataj. Ili distingiĝas per sia malkara laborforto. La malfeliĉaj negroj, kiuj jam tiel grandnombre pereis sur la koloniaj fervojaj konstruejoj, liverus novan laboristan kontingenton kaj signus la vojon per siaj kadavroj. Tiu ĉi detalo pri la mortado de l' laborforto estis konsiderata en neniu dokumento vidita de ni pri la transsahara konstruprojekto.

Resumo laŭ franclingva artikolo de J a k. P e r d ü (Perdu) en la gazeto "Monde".



IFA: Interesunuiĝo por laborista kulturo

Ĝi estas nova unuiĝo, kiu festis sian fondiĝon je la 13. oktobro ĉi-jare sub la moto: "Kulturrevolucio kontraŭ kulturreakcio!" La fondiĝfesto okazis en la "Plaza"-salonego antaŭ kelkmiloj da interesuloj. Sekve ĝi trovis bonan eĥon en Berlino.

Ĉiujn parolantojn oni forte aplaŭdis. M a s l o v s k i akcentis la gravecon, ke fine la laborista klaso elpaŝu el sia letargio. Ni ne toleru la burĝan cenzuron. La filmcenzuro furiozas por la interesoj de l' burĝa ŝtato. Oni malpermesis en Germanio la teatraĵon "Venengaso super Berlino" laŭ leĝparagrafo el la jaro 1896. Nun la burĝoj ellaboras "societ-leĝaron", kio signifas, ke oni povas malpermesi laŭ tio elmontradon de tiuj filmoj, kiuj estas malpermesitaj publike, en internaj rondoj.

Nova leĝo estas pretigata por ŝtata ŝirmo al la dioj. Tial devas sekvi la proleta defendo. Ni devas koncentrigi niajn fortojn, kaj nur tiam estos eble atingi sukcesojn. Hodiaŭ oni prezentas ĉiun fuŝaĵon sub la nomoj "popolteatro, popolarto, popolaltlernejo kaj kulturo". Por ni signifas kulturo ĉion, kio naskiĝas el la proletaj bezonoj de klasbatalo. Ni ne serĉas en la arto forgesadon de la ordinara tago, sed kuraĝigon por la klasbatalo kaj la solidareco.

Nia kulturo kreskas el la keloj, el fabrikoj kaj lukazernoj. La scienco pri la historia materialismo estas la spirita fundamento. Tian kulturon ni volas, tio estas por ni inda vivcelo.

H a n s A j z l e r (Eisler), muzikgvidanto, promesis al la amaso servi per bona muziko. For el la laborista muziko la ekleziajn kantojn! For la grandan fuŝadon, ni prezentu nur bonkvaliton! Dum la lasta jaro la regno fordonis 15 milionojn da mk. g. por konstrui la ŝtatan operejon. Kian utilon ni havas el tio? Nia muziko plenigu la programmankon ĉe laboristaj festoj per bonaj kaj klasaj ludaĵoj.

O t t o N a g e l parolis en la nomo de la revoluciaj pentristoj. Ni subtenas, li diris, la liberigan batalon per krajono kaj peniko en senco de Henriko C i l e (Zille). Kurt K l ä b e r deklaris la subtenon de la literaturistoj, kiuj rekrutiĝas parte el intelektuloj, parte el fabriklaboristoj. Ne unu vorto havas valoron, se ni mem ne staras en la batalo. Oni malpermesis niajn librojn. Longe ni staris izole, sed nun ni iros kune antaŭen. Intima kunlaboro kun la ruĝa gazetaro necesas en la senco de Karlo Marks kaj Lenin.

Ervin P i s k a t o r sciigas pri la perforto al la radio fare de la reakciuloj. Sur la kampo de l' teatro ni baziĝas sur marksismo. Sed nenio povas persisti sen la kritikanta proletaro. Tial ne en burĝa teatro, sed nur ĉe ni mem estu interpretataj verkoj de nia propra tendenco. (Ĉiam granda aplaŭdo.)

Poste la diversaj grupoj montris belajn tendencajn ludojn. La "ruĝa paroltubo" satiris pri la Sklarek-koruptafero en la burĝa respubliko germana[1]. Eriĥ V a j n e r t (Weinert), la plej konata Berlina poeto, deklamis kaj ricevis kiel ĉiam bruegan aplaŭdon. La orkestro sub gvidado de Ajzler ludis bonege.

La tuta prezento montris la forton de laborista klaso aganta komune. La arto je la servo de nia tendenco! La arto devas montri la klasdiferencojn kaj fortigi nin por plua batalo!

M a i e r G u s t l (3257), B e r l i n.



Malsatstriko de politikaj enkarcerigitoj en Hungario

Depost 1925 pli ol 200 politikaj arestitoj troviĝas en la diversaj karceroj de Hungario. Junaj K-doj, kiuj laboris, propagandis kaj batalis kontraŭ la reakcio, kiuj pretendis, ke anstataŭ intertraktoj kun registaro kaj burĝoj, oni gvidu la laboristan movadon sur la klasbatalan kampon. Ilia sola kulpo, ke ili kuraĝis alten levi la ruĝan standardon kaj ke ili intencis deflankigi la laboristojn de tiu vojo, kien la servantoj de la kapitalismo per ruzaj promesoj allogis ilin.

Unue ili estis terure batataj en la policejo. Kaj nun, kiam ili estas en la karcero, denove ili estas turmentataj:

[1] Koruptafero ĉe la Berlina magistrato.

MERSINA[1]

Tropika venteto susuras ĉirkaŭ la kabanoj, formintaj vilaĝon aŭ eĉ urbon. Montkonata estas la danĝera klimato, sed ĉi tiun la loĝantoj ne plu konsideras; ŝajnas nur, ke la fremdula sano estas minacata de tieaj malamikoj, kiaj estas malario, febro kaj malgrandaj kuloj, nomataj "moskitoj". Du minaretoj superstaras la en vesperan krepuskon vualitan urbon. Trankvilo regas, interrompita de la du preĝistoj blekadantaj sur la du minaretpintoj, kaj de knaretado de veturantaj veturiloj, interligantaj la urbon kun la stacio. Unu el la strangaj fiakroj ni uzas por atingi la centron de l' urbo Mersina. Malluma nokto ne permesas rigardon sur la renovigendan straton, kiu cetere kaŭzas ofte ŝanceliĝon ĝis eta senkonsciiĝo. Per 50 piastroj (ĉ. 0.30 dol.) ni pagis tiun spektaklon ĝis la rekomendita hotelo "Maarif". Dulita ĉambro, je nia dispono por du noktoj kaj unu tago, de sur balkono donas al ni perspektivon trans la mediteranean maron, kies muĝado kaj plaŭdegado ĝenas la dormanton, dum la ondegoj ĝisatingas preskaŭ la murojn de l' hotelo. Por esti sekura kontraŭ pikoj de moskitoj, la litoj estas ĉirkaŭitaj de blanka gazo, kiu alkondukas al la dormanto sufokan aeron, ofte atinganta varmegon de proksimume 35 gradoj laŭ Celsius. Post tera sendorma infera nokto, akompanita de mara ondfrapego senĉesa, preĝisto sur proksima minareto per stranga kantado indikas la kvaran matenan horon. Trankvileco, matena krepusko kaj subita ekapero de la matenlanda suno, ridetanta al ĵus vekiĝintaj loĝantoj, kiuj elektis la noktan ripozejon sur iu tegmento aŭ alta ŝtona plato apud la marbordo... Vagantaj hundoj serĉas, traesploras la rubamasojn, amasigitaj la pasintan tagon, kelkfoje trovas ostopecon. Ankaŭ la fiŝkaptado komenciĝas frumatene. Demetinte la ofte memproduktitan larĝan drappantalonon, tenante per ambaŭ manoj reton fiksitan sur fera aŭ ligna ringo, juna turko vadas ĝis la kolo en la frenezigaj marondoj. La stratoj iom post iom vigliĝas. Kriado de akvo- aŭ melon-vendistoj, kraketado de veturiloj, fajfegado de ŝipsirenoj, indikantaj la alproksimiĝon de pezaj ŝarĝŝipoj, estas la unua akto de ĉiutaga komedio. Spiregante la ŝarĝportistoj en la kotonmagazenoj surdorse trenas la pezajn kestojn kaj sakojn. Tiu ĉi estas la uverturo de banala ĉiutaga opereto de mahometano, kiu estas aŭ tre laborema aŭ kuŝas en la stratfosaĵoj sub ombraj arboj. Li estas kontenta, ĝui la liberan naturon malmultekostan. Je la 7-a matene la pordoj de l' metiejoj malfermiĝas. Videbliĝas niĉoj plenaj da sufoka aero kaj haladzo. Ne pli ol unu aŭ du personoj trovas en ili lokon por labori. Legombazaroj unu apud alia, kelkfoje ankaŭ kafejoj, en kiuj la mallaboremaj turkoj aŭ armenoj sidaĉas, skizas tiun strangan strattipon. Azenoj ŝarĝitaj per transporteblaj dormejoj paŝon post paŝo trotetas laŭ la en kamparon kondukanta strato. Laŭ la malrapida marŝtempo oni divenas, ke jam frumatene la varmiga suno kaŭzas inertecon al bestoj kaj homoj. Tutaj familioj kun infanoj, ŝtupigitaj kiel orgenaj tubaroj, estas transportataj sur dorsoj de azenoj. Kurbigitaj lignaj palisetoj, nepre necesaj por konstruado de tendoj aŭ kabanoj en la kamparo, ofte ne mankas. Por ni eŭropanoj tiuspecaj aspektoj estas tre interesaj. Funda esploro de la urbaj cirkonstancoj rezultigas la plej malagrablajn konkludojn. Peniga estas la vivo por la ĉi tiea popolo. Nur parteto povas konvene kontentigi sian vivbezonon. La plej granda parto apartenas al laborula tavolo. Portilojn sur dorsoj, la laboristoj frumatene jam komencas treni la pezajn ŝarĝojn. Malabunda manĝo,

[1] Urbo en Malgrand-Azio, havenurbo en golfo de Mersina.

Malbona manĝaĵo, manko de promeno kaj aero, — por ne paroli pri la naturaj deziroj de ilia korpo — rapide subfosas ilian sanon. Grave ili malgrasiĝis. Iuj perdis 5 — 7 — 12 kilogramojn, eĉ K-do Rákosi perdis 18 kg. de sia korpa pezo. Pli malpli ĉiu kaptas tuberkulozon, ftizon. Ili ne povas korespondi sen cenzuro. Ili ricevas librojn nur de burĝaj verkistoj. Fumi ne estas permesata, same ne la hejma manĝaĵo. Ili estas apartigataj en opaj ĉeloj. Komence, antaŭ ol la prokuroro priaŭskultis la arestiton, nek libron havi, nek kun la advokato paroli estas eble. Ĉi tio daŭras dum 4—6 semajnoj, kio dependas de tio, kiom da personoj estas implikitaj en unu afero ...

Kaj nun, kiel vekrio sonas al ni: La politikaj enkarcerigitoj, la K-doj malsatstrikas! La lastan kaj plej teruran rimedon ili uzas por ŝanĝi la nunan situacion: Ili ne manĝas! Prefere ili malsatmortas ol esti en tia stato! Ilia deziro ne estas granda. Ili deziras: 1. korespondi sen cenzuro; 2. enirpermeson de libroj, revuoj kaj gazetoj; 3. enporti hejman manĝaĵon; 4. permeson de fumado; 5. ke la politikaj enkarcerigitoj povu libere interrilati inter si.

Ilia vekrio devas aŭdiĝi trans la landlimoj kaj devas eĥi en la koroj de ĉiu klaskonscia K-do!

K-doj el ĉiu parto de la tero! Protestu ĉe la hungara registaro pro la turmento al niaj K-doj! Sendu telegramojn, protestleterojn, por ke la reakciuloj vidu, ke inter la proletoj regas solidareco kaj kolektivsento! Venu amase la protesto! (5418)

KUN TIU ĈI NUMERO ESTAS EKSPEDATA "LA LERNANTO"

SCIENCAJ ESPLOROJ EN ARKTA LANDO

Dum multaj jardekoj jam scienculoj, maristoj, romanistoj, komercistoj fantaziis pri la ne-ĝisatingebla punkto en arkta nordo. Ŝipoj el multaj landoj direktis sin tien, norden, por submeti al la homo la misteran, grandspacan polusan regionon. Kaj tre malmultaj ŝipistoj, foriĝintaj norden, denove ekvidis la kontinenton. Sub la kruela premado de l' glacimasoj krakis feraj ŝipkorpoj, glaciaj montoj disrompis la mastojn, ventegoj pelis la ŝipojn en nekonatajn glacidezertojn, kie la homoj pereis pro malvarmo, skorbuto kaj teruro en la arkta nokto.

Tamen homoj volas ekscii ĉion; persiste ili laboras ĉiujare per ekspedicioj por venki la poziciojn de l' Arkta lando. Nun estas instalita sur la tero nomata "Franc Jozefo", sovetia kolonio, plej oportuna bazo por sciencaj esploroj en latitudo de 81 gradoj, kaj kelkfoje per radio flugas meteologiaj informoj al la kontinento.

Ne ĉiu scias, kiom da viktimoj kaj embarasoj sekvis la malfermon de l' tero "Franc Jozefo". En la okdekaj jaroj de l' lasta jarcento la konata rusa anarkisto kaj scienculo Petro Kropotkin prezentis al Rusa geografia societo sciencan raporton, en kiu li skribis: "Al mi ŝajnas, ke ne nur sola insularo de Ŝpicbergen tenas egajn masojn da glaciaro, kiuj okupas spacon de kelkaj miloj da kvadratkilometroj kaj troviĝas konstante en la sama stato inter Ŝpicbergen kaj 'Nova Tero' (Novaja Zemlja). Ĉu tiu cirkonstanco ne donas al ni la rajton opinii, ke inter la insuloj troviĝas iu alia ne eltrovita ĝis nun tero, kiu etendiĝas norden pli malproksime ol Ŝpicbergen kaj tenas la glaciaron?" Kropotkin jam tiam petis caran registaron sendi al la nordo ekspedicion por ekprovi malkovri la nekonatan teron. Sed la tiama registaro pli multe pensis pri monopola profito ol pri ekspedicio scienca kaj rifuzis asigni por scienca progreso la necesajn sumojn.

Estis la aŭstria registaro, kiu unue forsendis ekspedicion en jaro 1872 por esplori tiujn regionojn de l' glacia oceano. En senluma arkta nokto la gvidantoj de l' ekspedicio Vajpreĥt kaj Pajer travivis 130 tagnoktojn. Dum duonjaro ili ne senvestiĝis por esti pretaj ĉiumomente laŭ alarmo forlasi la ŝipon. Post travintrado ĉesis la premo de l' glacio kaj ili povis moviĝi norden. Subite ili ekvidis antaŭ si la promontoron, kiun ili nomis laŭ sia imperiestro "Tero de Franc Jozefo". Ĉar ili restis pluan vintron, ili sukcesis fari la unuajn valorajn esplorojn.

La nunjara Sovetia arkta ekspedicio daŭrigis la laboron de l' aŭstria ekspedicio. Ĝi laboras en tiu regiono, kie tiom multaj ŝipoj de kuraĝaj ekspedicioj pereis. Fr. Nansen tie travintris kun sia "Fram" de 1893/94; en 1899 pereis tie tri ŝipistoj de itala ekspedicio, kiu perdis ankaŭ sian ŝipon "Amerika". Verŝajne sur tiuj bordoj pereis la rusaj ŝipoj "Anna" kaj "Herkules", serĉantaj la "grandan nordan vojon". En 1912 kvar ekspedicioj al nordo, tri rusaj kaj unu germana, finiĝis per plena aŭ parta katastrofo. En j. 1912 la ŝipo "Foka" sub gvido de G. Sedov direktis sin al

konsistanta el tomato kaj tritika pano, estas la preskaŭ ĉiutaga nutraĵo. Per unu mano la panon kaj per dua la tomaton tenante, englutas la laborbesto, kiel oni la kompatindulojn prave rajtas nomi, kaŭrante sur kesto per krucumitaj kruroj, sian maten- aŭ tagmanĝon. Modesta estas tiu speco da homoj en suda oriento de Malgrand-Azio, dum la fremduloj kaj riĉaj loĝantoj konsumadas la plej delikatajn palatoplaĉajn manĝaĵojn. La organizaj institucioj en tiu ĉi lando kaj mondparteto por laboristo per armea potenco estas malhelpataj. Militarismo estas ŝtate subtenata kaj la soldatoj, pro varmega temperaturo kaj sunbrilego unuflanke kaj pro vegetara nutraĵo aliflanke, estas ofte la fokuso de abomenaj strathistorietoj. Nur tro ofte la vizitanto de Mersina havas okazon, rigardi en la stratoj svenantajn soldatojn. Genufleksante ili malleviĝas teren, ĉar febro aŭ malario atakas la eluzitan korpon. Unu momento sufiĉas por kaŭzi kompaton ĉe rigardanto. Sed la enigmo estas facile solvebla. Tiuj estaĵoj ja nur estas homidoj devenantaj el la subhoma vivnivelo. Ilia trajto perfidas la psikozon. La tuta korpo ŝajnas esti vivanta kadavro. Ĉu la okuloj, rigardantaj el la orbitoj, indikas al preterpasanto internan kontentecon aŭ vivĝojon? Estas homa estaĵo apenaŭ 21-jara, al kiu la mondo alportis ĉagrenon, kaj finfine malamon inokulitan per siaj seniluziigitaj proksimuloj samsuferantaj. Ĉio tio estas la laŭroj de kelkcentjara tradicio alproprigita de tiu ĉi malklera homaro. Freneza komedio sterniĝas antaŭ niaj okuloj, sed tiu ĉi eltranĉo el la havenurbo Mersino estas kronita per kruela karcero. Fortikaĵsimila ĝi staras en la urbcentro, la krudaj muroj divenigas, ke ĉi tie loĝadas la mizero. Kelkminuta esploro de tiu surtera infero liveras kontentigan diagramon. Apud la larĝa pordego gardostaras per tika[1] uniformo vestita soldato. Unuamomente ŝajnis, ke li estas krimulo, kondamnita je dumviva restado inter tiuj muroj kruelaj. Sed li prezentas la Antaŭludon al diabla komedio. Preskaŭ svenante mi staras subite en la interna ejo de tiu ĉi giganta konstruo. Antaŭ miaj okuloj prezentiĝas kortuŝa dramo. Feraj stangoj, konvulsie ĉirkaŭkroĉitaj de centoj da malgrasaj fingroj, trankviligas la potenculojn, ke al tiu hombesto, kiu en ĉi tiu karcero vivaĉas, ne brilas la favoro forkuri el tiu ĉi infero. Mucida haladza aero, premega sufoka varmego eligas al kompatindulo en la kaĝego malantaŭ la krado petegajn kriojn pro guto da akvo aŭ panero. En tiu ĉi momento eĉ ŝtonoj moliĝus, sed la leĝo fieras pri tiaj heroaĵoj. Ĝi ne volas cedi antaŭ eksterlandaj institucioj tiuspecaj. Nur kelkajn paŝojn de la karcero estas la policejo "polis merkeze". Dua akto de nia dramo ekprezentiĝas. Tamen ĝi estas pli tolerebla. La teretaĝo estas disponigita al subaj policoficistoj, dum la unua etaĝo apartenas al pli aŭ plej altrangaj oficistoj. Jen estas preskaŭ ĉiu pordo sieĝata de kaŭrantaj mizeruloj atendantaj siajn pasportojn. Pacienco al tiu homspeco ne devas manki, ĉar ofte la pasportprocedo daŭras horojn aŭ eĉ tagojn. Eĉ sian vivon en tiuj oficistaj ejoj oni riskas, ĉar la policistoj purigas kaj oleumas siajn revolverojn kaj pafilojn ĉi tie. Dum en meza kaj okcidenta Eŭropo la laboristaro luktadas por sufoki la kontraŭlaboristajn batalojn, la laboristo en Malgrand-Azio obeas al ordonoj de militemaj turkaj strategoj, kies celoj estas, firmigi la nunan malkleron kaj malebligi al laboristaro prosperadon kaj kleriĝon. La eŭropa laboristaro ne forgesu subteni siajn fratojn en oriento: Nur komuna batalo gvidos al venko de l' tutmonda proletaro.

Josef Zink, SAT-ano 9437.

(Kolektitaj vojaĝimpresoj de nunjara forpermesa vojaĝo.)

[1] Tiko = teksaĵo kun duobla fadenaro.

arkta lando, sed la kuraĝa esploristo ne sukcesis pro ŝippereo en tiu jaro atingi la teron "Franc Jozefo"; nur jaron poste li trafis tien. La ŝipanoj suferis je skorbuto kaj pro la malvarmego. Sed Sedov ne rezignis atingi la Nordan Poluson. Kvankam malsana, li piediris kun du ŝipanoj en direkto al la poluso. Sed dumvoje li mortis sur la promontoro Brodok, ĉe la nordparto de l'tero Rudolf. Tie, kie mortis la unua akompananto de Sedov, ĉe insulo G u k e r, enbordiĝis nia Sovetia arkta scienca ekspedicio. Kaj sur la arkipelago de "Franc Jozefo" estis komencata la konstruado de l'unua plej norda Sovetia kolonio.

A l e k s. E r j u ĥ i n (9682)
(laŭ "Pravda Severa"). Resumo.



Kelkaj faktoj pri Hindio

Kvankam la unuo konata sub la nomo de l' Hinda Imperio, regata depost 1876 de Granda Britio, ĝenerale estas konsiderata kiel unuo de l' geografia vidpunkto, ĝi tamen estas dispartigita, de l' politika vidpunkto, je du tre distingaj partoj: la Brita Hindio, entenanta 2 834 237 kvadrat-kilometrojn k 247 milionojn da loĝantoj, k la aŭtonomiaj hindaj Ŝtatoj, reprezentantaj areon de 1 841 571 kvadrat-kilometroj k loĝantaron de 72 milionoj da personoj, laŭ la nombroj de l' popolnombrado en 1921. La reĝimo de tiuj du partoj de Hindio ne estas identa, precipe de kiam Anglio, sub la premo de la amasoj, anoncis, en 1919, sian intencon realigi "la disvolvon laŭgradan de memregado (angle: self-government) kun la celo starigi iom post iom respondecan registaron en Brita Hindio, kiel konsistparto de l' Brita Imperio" (H i n d a R e g i s t a r a A k t o, 1919, antaŭparolo).

La hindaj p r i n c o j, kiuj regas sur proksimume triono de l' teritorio de la duoninsulo, k kiuj estas en nombro de 562, restas sendependaj de tiuj ĉi projektoj de "demokrata" reformo; iliaj rajtoj k privilegioj kiel aŭtonomiaj regantoj estas al ili "garantiitaj" de Anglio. Parte por permesi al ili grupiĝi k validigi siajn rajtojn, estas starigita, sekve de la konstituciaj reformoj de 1919, Ĉambro de princoj en Delhi en j. 1921, flanke k ekster la centra parlamento (vicreĝo, Ŝtatkonsilantaro kaj leĝdona Kunveno) komisiita regi super Brita Hindio.

Havinda eldonaĵo de SAT estas

Prologo

Poemaro originala de **E. Mihalski**
64 pĝ. kun titolbildo

Ĉiu homo travivas horojn, en kiuj li serĉas konsolon aŭ emas revi k satiĝi en dolĉa revado. Bela poezio estas mirinda satigilo. La lirikaj poemoj de Mihalski, en sia literatura formo senriproĉaj, meritas esti en la manoj de ĉiuj poezi-amikoj.

Prezo: **0.70** mk. g.

Administracio de SAT, Colmstr. 1, Leipzig O 27

EKONOMIAJ NOTOJ

La industriiĝo de Turkio

La nacia Kunveno turka decidis antaŭ ioma tempo difini krediton de 18 milionoj da turkaj funtoj (9 milionoj da dolaroj) por la kreado de pez-industrio. Tiel oni preparas sin efektivigi projekton, kiun oni planas jam de pluraj jaroj kaj kiu antaŭvidas la konstruadon de fandfornegoj, ŝtalfabrikoj kaj lamenigiloj proksime de Angora.

Turkio posedas la necesajn materiojn: ĝi havas ŝtonkarbajn tavolojn sur la bordoj de la Nigra Maro kaj fermineralojn en Anatolio. Fervojoj, parte konstruataj kaj parte projektitaj, certigus la provizadon de tiuj ĉi entreprenoj per brulŝtofo kaj ferminaĵo. Sed ankoraŭ oni devus fari ekspluateblaj tiujn tavolojn, havigante al si la tutan ilaron nepre necesan por la minindustrio.

La realigo de tiuj projektoj alportos grandegajn mendojn al la eŭropa industrio, kiu ĵetas sin de nun sur tiun ĉi novan disvendejon. Ĉiuj instaloj, ĉiuj maŝinoj, la tuta ilaro devas veni el eksterlando. Oni diras, ke la turka registaro jam intertraktas kun germana kartelo, en kiu partoprenus ankaŭ la fama A. E. G. (Elektra Kompanio), kiu antaŭ du monatoj transdoniĝis al la usona kapitalo.

Por tiu ĉi entrepreno de giganta amplekso oni bezonas samtempe monkapitalon kaj materi-kapitalon (maŝinojn ktp.). Unu kaj la alia estos liverataj de la industriaj landoj, kiuj trovos tiel la eblon investi la kapitalojn, kiujn ili ne povas eluzi profitdone ĉe si mem, kaj samtempe la okazon sendi en novlandon la produktojn de siaj industrioj ĉe manko de vendmerkatoj.

Tiu ĉi ago kapablas moderigi la momentan malviglecon de l' eŭropa ekonomio. Sed en iu tago, kiam la novaj fabrikoj ekfunkcios, ili leviĝos kiel timindaj konkurantoj fronte al la eŭropaj entreprenoj, kiuj donis al ili la vivon.

En la aŭtomobila industrio

Kontrakto estas subskribita inter la reprezentanto de Ford kaj la urbestro de Kolonjo (Köln), koncerne al konstruado de fabriko sur la maldekstra Rejnbordo, norde de Kolonjo. Ford forlasos siajn munt-laborejojn de Berlino kaj instaliĝos definitive en Rejnlando. La nova fabriko ne kontentiĝos per muntado de pecoj importitaj el Usono, sed ekplenumos mem la konstruadon de veturiloj. Tiele Fordo preparas sin ekspedi siajn produktojn en Centran kaj Orientan Eŭropon. Kolonjo estas cetere sufiĉe bone lokita por faciligi la invadon al la merkatoj belga, franca kaj nederlanda per la Ford-veturiloj. Krome oni devas atendi seriozan batalon inter Ford kaj la Opel-fabrikoj (vasaliĝintaj al G e n e r a l M o t o r s) en la interno de Germanio.

La formiĝo de granda k o n c e r n o de l' ĉeĥoslovaka aŭtomobil-industrio estas ankaŭ hodiaŭ plenumita afero. Temas pri konvencio instiganta la intiman kunlaboradon de tri grandaj aŭtomobil-produktantaj societoj: la fabrikoj Skoda, la societo Ĉeskomoravska Kolben kaj la armilfabriko de Brno, sub la kontrolo de unu el la plej grandaj bankoj de Ĉeĥoslovakio, la Zivnostenska Banko. Tiu ĉi giganta koncerno, kiu ampleksos la tutan aŭtomobilfabrikadon de l' lando, ekkomencos la raciigon de ĉi tiu industrio en la nacia skalo.

La tri societoj, konsistigantaj la novan koncernon, "kompletigas" siajn entreprenojn, alligante al si pli malgravajn fabrikojn aŭ akirante akciojn de aliaj societoj por superregi ilian agadon. Tiel la Ĉeskomoravska "partoprenas" ĉe la municifabrikoj Roth en Presburgo (Bratislava), Skoda "partoprenas" ĉe la armilfabrikoj de Brno (Brünn) kaj Adamstal. La Brno-a armilfabriko kaptis la aviadil-konstruajn fabrikojn Letnan.

Sed oni planas jam pli intiman kunlaboradon inter ĉiuj aŭtomobilfabrikoj de Eŭropo. Jena informo aperis antaŭ kelkaj tagoj en la gazetaro: "La delegitoj de l' germana aŭtomobil-industrio, revenintaj de Parizo, kie ili ĉeestis la kunvenon de aŭtomobil-konstruantoj de Eŭropo, deklaris al la B e r l i n a T a g m e z a G a z e t o, ke temis en la Parizaj konversacioj pri kontaktiĝo inter la ĉefoj de l' granda aŭtomobilfirmoj de Eŭropo, kun celo prepari la vojon al eŭropa k a r t e l o d e a ŭ t o m o b i l f a b r i k a n t o j. La traktadoj bone envojigitaj, estos daŭrigataj je nedifinita dato."

L. L o r a.



EL USONA TAGLIBRO

Preskaŭ ĉiutage dum oktobro oni povis legi en ĵurnaloj pri komunisto aŭ sindikat-organizanto bategita kaj en komerca parto: "Pli granda Trusto". "Firmoj formas Kombinegon"... Plejparte la sindikatestroj nur fanfaronas pri la kvanto da bankuvoj, da aŭtoj uzataj de la kompare bone salajrataj metiistoj. Proksimume nur 3 el 30 milionoj da laboristoj aniĝis al sindikato. La socialista Partio nombras 12—13 000 kaj la Kom. Partio 14—16 000 membrojn pro ĵus okazintaj dividoj kaj eksigoj. La IWW estas nur ombro kompare je sia antaŭa forto. Komenciĝas penoj starigi Labor-Partion laŭ la brita modelo. Sed ĝis la iluzio pri ĝenerala prospero iom malaperos, la laborista movado haltos. Nuntempe ankaŭ la laboristo, krom aŭto kaj bankuvo, povas posedi akciojn kaj tiel "demokratigi" la industrion. Dum la somero la spekulacio saltis ĝis la ĉielo, sed en oktobro la "ursoj" (idiomo por la homoj, kiuj volas igi vendi la akciposedantojn, kontraŭe al la "bovoj", kiuj perkorne supren ĵetas la akcioprezojn) profitas el kurz-falo dum unu tago en valoroj de 5 dolar-miliardoj! Kompreneble la trustestroj kaj la bankestroj havas fidindan informon; la laborista akciposedanto timiĝas kaj vendas je perdo.

Korekto. En n-o 265, pĝ. 58, 1-a kol., lin. 30 de malsupre, legu "tut**on**" anst. "tutan".

SENNACIULA EDUKISTA PAĜO

N-o 2 Sub kontrolo de SAT-edukista sekcio. — Redakci-adreso: M. Boubou, 96, rue Saint-Marceau, Orléans (Loiret), Francio N-o 2

SAT-EDUKISTA INFORMSERVO

De nun aperos regule nia "Sennaciula Edukista Paĝo" ĝis kiam la SAT-edukistoj havos sian propran organon sub SAT-kontrolo. Nia celo estas duobla:

1. Doni al ĉiuj niaj SAT-K-doj plej popularforman aktualan materialon pri edukado kaj avangarda edukista movado represigeblan sur ĉiuj laboristaj gazetoj.

2. Instigi la SAT-edukistojn kunlabori per sendo de dokumentoj kaj tiel ilin pretigi al partopreno en la vasta informado jam komencita de Tutmonda Esperantista Pedagogia Servo (TEPS en manoj de SAT-anoj) kaj forte disvolviĝonta per kreo de la "Sennacieca Pedagogia Revuo".

Pro ekzisto de la "Soveta Pedagogia Revuo", kiun ni varme rekomendas (sin turni al K-do Lerchner por abono) kaj pro publikigo de specialaj kajeroj de "La Nova Epoko" pri soveta lernejo, ni preferas artikolojn el nesovetaj landoj. Ankaŭ tre dezirata estas materialo prieduka tradukita aŭ verkita de needukistaj SAT-K-doj.

Marcel Boubou.

RUĜA FLAGO EN PREĜEJO

En laborista provinco Kajdaki staras, konstruita per mano de laboristoj Brjanskaja preĝejo. La laboristojn oni devigis doni 1% el salajro por konstruadi ĝin. Tio ĉi okazis antaŭ 16 jaroj. Tio ĉi estis en malnovo. Dum ĝia inaŭguro ĉeestis mem caro Nikolao la II-a. Nun 23000 laboristoj de fabrikoj je nomo Petroka kaj Lenin postulis ĝian fermon, ĉar ĝi estis kulturejo de malklero, malkulturo kaj kontraŭ revolucio. Ukrainia Centra Ekzekutiva Komitato kontentigis ilian peton. La preĝejo estas fermita. Krucoj estas rompitaj. En ĉefa kupolo flirtas ruĝa flago. En la preĝejo oni faris ekspozicion pri sukcesoj de ukraina metalurgio. Dum amaskunveno ĉe fermo de la preĝejo ĉeestis miloj da laboristoj, studentoj, infanoj, elpaŝis multe da maljunuloj-laboristoj, kiuj konvinkiĝis pri malutilo de la preĝejo. El sonorilejo aŭdiĝis muziko de l' "Internacio". Tio ĉi estas ankoraŭ unu venko en fronto de kulturo!

Viktoro Kopejkin.


Kontraŭ la kadavro-kulton

Mi deziras, ke en nenia okazo, ĉu proksima, ĉu malproksima, k nenial ajn, oni faru antaŭ mia kadavro ceremoniojn kun politika aŭ religia karaktero; mi konsideras, ke la tempo elspezata por prizorgi mortintojn estus pli bone uzata por plibonigi la staton de vivantoj.

El la Testamento de Francisko Ferrer.

PRI INFANA MANLABORO

Post liberiĝo de l' laboristaro en Rusio la soveta registaro tute rekonstruis la lernejojn, aliigis sistèmon kaj metodojn de instruado. Nun ne plu regas skolastiko en klerigado kaj edukado de l' infanaro. Soveta lernejo tre proksimiĝis al realeco, al vivo. "Laboro", "Socio", "Naturo" — jen estas bazo de lernado. "Laboro" estas ĉefa, forta fundamento. Sen laboro ne povas esti vera lernado. Tial multaj lernejoj estas fiksataj al fabrikoj, laborejoj (kunligataj kun ili en sia laboro). Vilaĝaj lernejoj estas forte kunligitaj kun kamparana laboro. Plej forte pravigas la nomon "Laborlernejo" tielnomataj "FZS" (fabrik-laborejaj sepjaraj laborlernejoj), da kiuj ekzistas en tuta Sovetio 23. Ĉiujare ĝia nombro pligrandiĝas.



Tiu ĉi foto montras kvaronan parton de 2-a klaso dum manlaboro. Sidantoj trancas kartonon. Sur la muroj pendas ekspoziciaĵoj: birdodometoj, modeloj de aeroplanoj, ventmuelileloj, ŝaktabuletoj ktp. (urbo Krjukov — apud Dnepro)

Nia sepjara fabrika lernejo (FZS) estas kunligita kun vagona metiejo. Por I., II., III., IV. grupoj (aĝo de gelernantoj: 9, 10, 11, 12 jaroj) estas organizita universala metiejo, en kiu la gelernantoj faras kartonaĵojn, lignaĵojn, feraĵojn, ili trancas, boras, gluas, najlas ktp. Infanoj de 5., 6., 7. klasoj (aĝo 13, 14, 15 jaroj) praktikas manlaboron en vagona metiejo) laŭ du fakoj: ligna kaj fera (lignaĵista kaj serurista).

La manlaboro estas forte kunligita kun plana lernlaboro. Ĝi estas fundamento de ĉiu lernado. Fiziko, matematiko, lingvo k. a. fakoj helpas al ĝi. Infana laboro tute ne celas konstrui bonan objekton por poste vendi ĝin aŭ uzi. Ĝi celas nur eduki infanan scipovon por laboro, kiun naturo metis al ĝi de naskiĝo, eduki kiamanieron (metodon) de bona kaj vera konstruado de tiu aŭ alia objekto. Krom tio ĝi celas helpon al instruistaro ekscii infanan profesian orientiĝon (elekto, difino de infana profesio).

Ĉar tiu ĉi lernejo edukas infanojn de laboristoj (plimulte) de vagona metiejo, realigo de produktado estas difinita: plimulto da gelernantoj eniras pli superan fabrik-laborejan lernejon "FZU" (por 16 ĝis 20-jaruloj), en kiu ili pli perfektiĝas je sia profesio, ricevas rangon de kvalifiko kaj eniras fabrikon kiel plene kvalifikitaj kaj edukitaj gelaboristoj. Malplimulto el ili eniras aliajn profesiajn lernejojn — medicinan, instruistan, komercan ktp., ĉar dum 7-jara lernado ili tute ne havis sukceson en manlaboro pro sia malbona korpa sano aŭ deziro havigi al si intelektan laboron (ne manan).

G. Babejkin.

BATALAJ FLANKOJ DE SOVETA LERNEJO

La nova instrujaro 1929—1930 antaŭenigas, kiel plej batalan linion por soveta lernejo, pliatentigon al demandoj de klasbatala komunista edukado kaj al plia kunproksimiĝo kun ĉirkaŭanta vivo.

Konkrete ĉi tiuj taskoj esprimiĝas en jeno:

1. Kontraŭreligia infanedukado kaj batalo kontraŭ religiaj superstiĉoj, kredoj inter loĝantaro.

2. Internacieca infanedukado kaj batalo kontraŭ nacia "ŝovinismo" inter loĝantaro.

3. Laboreca edukado, perlabora preparo de l' infanoj al vivo kaj agronomiigo de l' lernejo.

4. Kolektiveca edukado kaj organizado de l' infanoj per por-sociutila laboro, helpanta al solvo de taskoj, kiuj staras antaŭ la laborista klaso kaj soveta registaro. En nombro de ĉi tiuj taskoj fundamentaj estas:

a) suprenleviĝo de rikolto;
b) industriigado de nia lando kaj kolektivigado de l' kampara mastrumado;
c) militdefendo de USSR.

5. Kunproksimiĝo de lernejo kun la reganta partio, komsomolo (Komunista Junulara Unio) kaj pioniroj.

6. Organizado de porpedagogia propagando inter loĝantaro kaj plibonigo de laboro kaj vivmaniero de infanoj dome (precipe tio koncernas infanojn de vilaĝana malriĉularo), plibonigo de infana materia kaj jura stato.

Ĉiuj tiuj taskoj, prilaboritaj dum aŭtunaj instruistaj konferencoj eniras en jaraj orientigaj planoj de ĉiuj lernejoj en USSR por 1929/30 kaj estos pli ol antaŭe atentataj.

A. B. Ŝatalov.

Esperanto-Servo

N-o 7 — 4-a jaro Gvidanto k kompilanto: O. BÄSSLER, Ebermayer-Str. 8, I, Leipzig C 1 (Germ.) 14. Novembro 1929

EL RUMANIO

Strik-malvenko en la vagonfabriko "Astra" en Arad

(Esperanto-Servo.) Post 8-semajna striko la laboristaro de la vagonfabriko "Astra" en Arad la 21-an de oktobro devis rekomenci la laboron. La striko estis malvenka, kvankam la laboristaro komence esperis al plena sukceso. Sed la direktoraro uzis ĉiajn rimedojn, por malsukcesigi la strikon. Kunvenoj ne estis permesitaj; du K-doj de la strik-komitato, kiuj ĉiumatene postenis sin ĉe la fabrikpordego, estis arestitaj, ĉar ili provis konvinki la strikrompintojn pri sia perfida rolo. Inĝenieroj venis al laboristoj, por voki ilin al laboro ... Kiam ĉi ĉiuj rimedoj ne sukcesis, oni venigis laboristojn el "Regat" (malnova rumana regiono) k el proksimaj vilaĝoj. Sed nur troviĝis malmultaj strikrompantoj, kiuj liveris plej parte fuŝ-laboron. Tamen finfine la laboristaro devis cedi sen sukceso, ĉar la direktoraro "interkonsentis" kun la fabrika enket-komitato, kiu pro iuj kaŭzoj perfidis la strikon. Tiu tiom esperplene komencita striko instruas al la laboristaro, ke tuj ĝi devas elekti pli fidindan enket-komitaton k estonte pli atenti ties agojn! Ni tamen ne malesperas ...

SAT-ano 15 080.

Modernaj fabrik-gesklavoj en "ITA"

(Esperanto-Servo.) Kiu eniras la fabrikon "ITA" (teksfabriko en Arad), tiu facile povas imagi al si la famegan inferon de Dante. En "ITA" regas plej malnova sklava sistemo. La leĝigita 8-hora labortago estas nuligita. La laboristoj laboras 11—13 horojn po-tage. Pago por kromhoroj ne ekzistas. Maldungoj estas ĉiutagaj. La laborestroj preskaŭ ĉiutage vangofrapas precipe junajn knabinojn. Multe da beljunaj knabinoj devas viziti majstrojn en siaj loĝejoj, por kontentigi majstran voluptemon. Se knabinoj tion rifuzas, la majstroj simple minacas per maldungo. La malsat-salajro por 76—86 horoj estas 600—650 leoj. La laborejoj estas tre malpuraj, plenigita per densa polvo. En virin-bezonejoj (necesejoj) estas viraj gardistoj, kiuj observas ke neniu restas pli longe ol 5 minutojn en la bezonejo. La ĉirkaŭaĵo de bezonejo malbon-odoregas pro la malpureco. — Milionoj da laboristoj malsatas pro la mizerego, dume la riĉuloj pli k pli dikiĝas.

SAT-ano 15 080.

EL POLIO

Perlaboroj en Polio

(Esperanto-Servo.) En hodiaŭaj kondiĉoj de burĝa estado k sam-tia moraleco neeble estas juste reguligi perlaborojn. Bonvolu kompari. Ministo ekz. perlaboras ĉiutage ĉ. 10 zlotojn (iom pli ol 1 dolaro) — pomonate 250 zl., dume direktoro de "solida" bankoficejo "perlaboras" pomonate 7000 zl. Teksisto perlaboras ne pli ol ministo, dume unuarola aktoro ricevas 5000 zl. Masonisto (1-a-ranga) en Varsovio perlaboras pomonate 400 zl. (en sezono), dume opereta artistino ricevas por la sama tempo ĉ. 6000 zl. Oficisto, ĉetable laboranta 8 horojn, ricevas pli ol 200 zl., dume ĵokeo eksidanta ĉevalon de "sinjoro grafo" faras fortunon ...

C. G.

Reĝa juĝejo en respubliko Polio

(Esperanto-Servo.) La distrikta juĝejo en Vroclavek dissendas ankoraŭ nun siajn dokumentojn sigelitaj per kvin grandaj vaks-sigeloj kun surskribo: "reĝpola distriktjuĝejo en Vroclavek". En Polio oni ne povas forgesi pri reĝoj k tial ni ĝis nun havas reĝajn juĝejojn. Ni nur ne scias, je nomo de kiu reĝo ili verdiktas.

C. G.

Senhejmuloj en la ĉefurbo de Polio

(Esperanto-Servo.) Laŭ oficiala statistiko en la ĉefurbo de Polio, en Varsovio, senhejmas momente 1892 personoj. Sed kiom efektive senhejmas, se jam la oficiala statistiko estas tiom alta? ...

C. G.

EL GERMANIO

"Reformoj" en la senlaborula asekuro

(Esperanto-Servo.) Ŝajnas, ke la burĝaro ankoraŭ ne kuraĝis ĵeti el la registaro la socialdemokratajn ministrojn. Ĉe findecido pri la aliigoj en la senlaborula asekuro ĝi ne persistis pri gravaj malbonigoj, unuvoĉe postulitaj de ĉiuj burĝaj partoj. La ĉefa postulo, malaltigi ĝenerale la subvenciojn, falis; sed tamen por la needziĝintaj senlaboruloj k por laboristoj senlaboriĝantaj regule je fino de sezono (konstrulaboristoj) la nova leĝo enhavas malagrablajn aliigojn. Neniu kredas, ke la burĝara batalado kontraŭ la senlaborula asekuro per tio finiĝis. Ĝi daŭros ĝis finvenko de unu aŭ de la alia parto.

G. N. (3018), Chemnitz.

Nova laborista grandsindikato

(Esperanto-Servo.) Ĵus kunfandiĝis la organizoj de la trafik-, ĝarden-, ŝtat- k komunum-laboristoj kun kune 675 mil membroj. La sindikato de la fajrobrigadistoj baldaŭ aniĝos al tiu unuecsindikato. La laboristoj el la metioj de nutraĵoj k trinkaĵoj nur antaŭ nelonge same unuigis sin en unu centra organizo.

G. N. (3018), Chemnitz.

Needziniĝintaj virinoj pereu!

(Esperanto-Servo.) La loka malsanula asekurejo en Leipzig (Lajpcig) decidis konsenti, ke virinoj, kiuj laŭ kuracista juĝo dum gravedeco venus en danĝeron, ricevu kontraŭ-gravedigajn rimedojn je kostoj de la asekuro. Tiun decidon komentas la gazeto de la saksa kuracista sindikato jene: "Ĉi tiu decido esperebIe validas nur por edziniĝintaj membroj, aliokaze oni vidus en ĝi favoron al la senvirteco". Nia komento nenecesa ...

G. N. (3018), Chemnitz.

EL SOVETIO

Progreso de laborista universitato

(Esperanto-Servo.) En nuna instrujaro en la laborista vespera universitato de urbo Tver la nombro de studentoj pligrandiĝis al 400 (en pasinta jaro nur estis 150 studentoj). Inter la nove akceptitaj studentoj estas 38% teksistoj, 18% metalistoj. En tiu ĉi jaro la oficistoj en la universitato estas 10%. La universitato funkcias trifoje dum semajno. En proksima tempo oni organizos ĉe la laborista universitato kontraŭreligian ciklon, por kiu oni akceptas 40 studentojn. La kursoj daŭros dum du jaroj.

Filippova, Tver.

Plej forta radiostacio en Eŭropo

(Esperanto-Servo.) La 14. 10. 1929 ekfunkciis nova radiostacio — de la Tutsovetia Centra Konsilantaro de l' prof-unuiĝoj — plej potenca, ne nur en Sovetio, sed en tuta Eŭropo (100 kilovatoj). La stacio laboras en Ŝĉelkovo (apud Moskvo) je ondlongo 938 metroj, matene k vespere en diversaj lingvoj. Enhavo: laborista tagmezo, aktualaj raportoj, masa profunuiĝa gazeto, artmuzika fako, internacia laborista disaŭdigo ktp. La aŭskultebleco estas tiom bona, ke jam post provdisaŭdigoj venis el eksterlando multaj leteroj (ĉu ankaŭ en esp-o?), en kiuj ties aŭtoroj skribis pri sia deziro, esti konstantaj aŭskultantoj, de la voĉo sonanta de la sovetia Oriento.

B. Esperkoro, Samara

RESPONDA PARTO

12 638, 1162, 14 586, 12 211, 12 721, 7471. Viaj raportoj prokrastitaj, sed aperos.

5583. Vidu paĝon n-o 6, kie senĉesa produktado traktita. Aliaj du raportoj aperos.

15 080. La mallonga raporto ne tre taŭgas ...

Verkante raportojn, skribu plej koncize k multenhave, por eviti ke ni devas mallongigi (kripligi) ilin. — Atentu la novan adreson de la Centrejo de Esperanto-Servo.

7-a listo de raportoj en jaro 1929/30

34. Strik-malvenko en la vagonfabriko "Astra" en Arad. SAT-ano 15 080 (Rumanio).
35. Modernaj fabrik-gesklavoj en "ITA". SAT-ano 15 080 (Rumanio).
36. Perlaboroj en Polio. C. G. (Polio).
37. Reĝa juĝejo en respubliko Polio. C. G. (Polio).
38. Senhejmuloj en la ĉefurbo de Polio. C. G. (Polio).
39. "Reformoj" en la senlaborula asekuro. G. N. (3018), Chemnitz (Germanio).
40. Nova laborista grandsindikato. G. N. (3018), Chemnitz (Germanio).
41. Needziniĝintaj virinoj pereu! G. N. (3018), Chemnitz (Germanio).
42. Progreso de laborista universitato. Filippova, Tver (Sovetio).
43. Plej forta radiostacio en Eŭropo. B. Esperkoro, Samara (Sovetio).

TRA ESPERANTIO

ĈU VI VOLAS VERKI ARTIKOLON?

Se jes, mi rekomendas atenti ĉi sekvantajn konsiderojn. Presita artikolo kaŭzas ĉe plej multaj homoj pli grandan respekton ol io parolata. La kaŭzon de ĉi tiu fakto mi ĉi tie ne intencas esplori. La spirita nivelo de iu gazeto dependas de la logikeco, spirita profundeco, objektivemo, lojaleco k legindeco de ĝia enhavo. Ĉar nia "S-ulo" ne estas bagatelaĵo, ĝi devas esti skribita laŭ supre cititaj principoj.

Kelkfoje observitaj "pekoj" instigis min verki ĉi tiujn liniojn. Kiu arogas anstataŭigi la nomitajn principojn per insultoj aŭ nenionpruvantaj mokoj, tiu fuŝegas sian propran famon, kaŭzas al la redaktoro ĉagrenon k ŝanĝan laboron k difektas la indecon de nia internacia ligilo. Ĉar "S-ulo" estas edukilo, ĉiu, kiu volas helpi en ĝi per verkado de artikolo, devas pruvi sian edukant-indecon per propra sintenado, do, per enhavo de sia artikolo. Marksisto antaŭ ĉiu devas scii, ke, kiel en la mondo la formoj k vivo ŝanĝiĝas, tiel ankaŭ ŝanĝiĝas la ideoj, opinioj de la homoj. Ne ekzistas eĉ du homoj vivantaj sub akurate samaj influoj, sugestoj ktp. Ĉar la ideon ĉe homo kreas ĝiaj medio, ekonomia k spirita dependeco ktp., tial ni proletoj svarmas en abundo de diversaj opinioj. Ni laboruloj en familio, lernejo, eklezio, per gazetaro ktp. ne estas ĝenerale edukitaj al memstara pensado. Eĉ la plej multaj sin nomantaj "liberpensuloj" nek pensas, nek agas laŭ liberpensismo. Riska aserto, tamen prava! Sed la kaŭzojn mi tre bone konas kaj tial preferas ne insulti, sed diskuti kun ili. Ju pli agrablan formon havas la diskutado, des pli forta estas ĝia efiko.

Kompreneble, per unu hako ne jam falas arbo! Germana proverbo diras: "Kiu insultas, tiu estas malprava!" Per tio mi ne intencas diri, ke neniu homo meritas insulton. Ho jes, konscian trompulon mi eventuale eĉ emus vangofrapi! (Ĉu prave? Mi ne scias!) Sed, ĉu inter nia SAT-anaro ekzistas tiaj malinduloj? Nia aro kredeble konsistas pleje el trompitoj de diversspecaj interesuloj (regantoj, eklezioj, politikistoj ktp.). Konsciante pri tio n i i n t e r n i forlasu ĉian ofendemon al iu, kies opinio ne jam aŭ ne plu konkordas kun la nia. La multdiversaj laboristaj tendencoj organizaj facile kaŭzas konfuziĝon k fanatikon. Des pli ni SAT-anoj kreu k konservu solidan bazon por niaj interrilatoj. Al starigo de tia bazo povas, devas helpi ĉiu, kiu verkas diskutartikolon por "S-ulo".

Ni elektu: aŭ la klasbatala okupo konduku al homeco aŭ al morala bankroto!

A. v. d. H e i d (61), Dortmund.

EL LA ADMINISTREJO

Laŭ la decido de la 9-a SAT-kongreso en Leipzig, ke la tarifo por membrokotizo estu pli altigata je ¼ de la nuna kotizo, kaj ke rekompence aperu ĉiuj adresoj kun la profesio en la jarlibro, — la Direkcio kune kun la Administrejo fiksis jenan kotizon por la diversaj landoj:

Tarifo por membrokotizo 1930

(La ciferoj inter krampoj indikas la aliĝ-kotizon por novaliĝantoj)

Argentino 1,90 (0,40) pes.; Aŭstrio 3,75 (0,50) ŝil.; Belgio 3,10 (0,50) belg.; Brazilio 5 (1) milr.; Britio 3 (½) ŝil.; Bulgario 65 (10) lev.; Ĉeĥoslovakio 15 (3) kr.; Danio 2,50 (0,50) kr.; Estonio 1,80 (0,25) kr.; Finnlando 18 (4) mk.; Francio 12,50 (2,50) fr.; Germanio 2,50 (0,50) mk.; Hispanio 3,70 (0,70) peset.; Hungario 2,50 (0,50 peng.; Italio 12,50 (2,50) lir.; Japanio 2 (0,40) jen.; Jugoslavio 30 (6) din.; Latvio 2,50 (0,50) lat.; Litovio 5 (1) lid.; Nederlando 1,60 (0,30) guld.; Norvegio 2,50 (0,50) kr.; Polio 4 (0,80) zlot.; Portugalio 10 (2) esk.; Rumanio 65 (15); lej,; Sovetio 1,25 (0,25) rubl.; Svedio 2,50 (0,50) kr.; Svisio 3 (0,60) fr.; Turkio 1,25 (0,25) lir.; Usono 1,25 (0,25) dol. — Por aliaj ne cititaj landoj la kotizo estas samvalora al 2,50 mk. germ. — En familio, kie estas pluraj SAT-anoj, nur unu pagas la plenan kotizon, la aliaj nur la duonon, tamen nur tiu ricevas la Jarlibron, kiu plene pagis la kotizon.

Ni ĝentile petas niajn membrojn, kiuj jam pagis la kotizon por la jaro 1930, konsideri ĉi tiun fakton kaj okaze sendi al ni bonvole la diferencon inter la jam pagita kaj la nuna publikigita.

Municio por SAT kaj ĝiaj Organoj

H o ŝ e k (10032) 1,20 mk.; F r a n k (Perm) 10 mk.; L v o v (Zinovjevsk) 6 mk.; S c h r a m m (Selb) 1 mk.; N a u m a n n (8130) 1,40 mk.; W a g n e r (4182) 1 mk.; — B r i k o j : Baĵenov (Ĉita) 3 rubl. — Sinceran dankon al niaj donacantoj!

AL ĈIUJ PAĜ-REDAKTOROJ!

Estas necese, ke vi kalkulu kiel eble plej precize la amplekson de via materialo, por ke ĝi nepre ne superu plu unu plenan paĝon de "S-ulo"! Pro teknikaj cirkonstancoj, ĉe la nuna aranĝo de "S-ulo" al ni ne estas eble konsenti pli da spaco. Cetere ni tute laŭvice, alterne enmetas la diversajn Paĝojn; 5—6 Paĝoj estas regule alternantaj; vi do povas kalkuli, en kia dato aperos via materialo k zorgi, ke ĝi ĝustatempe (t. e. almenaŭ 15 tagojn antaŭ la aperdato) estu en niaj manoj.

L a R e d a k c i o.

EKSPOZICIO EN LA KOMUNISTA AKADEMIO

7. novembro malfermiĝos en Moskvo Ŝ t a t a e k s p o z i c i o de nova skribado de la popoloj en USSR. La ekspozicion organizas Ŝ t a t a K o m u n i s t a A k a d e m i o, supera scienca organo de USSR, egala al ĉiuj tutmondaj Akademioj de Sciencoj, sed kreanta novan pensadon k novan sciencon sur bazo de marksismo k komunismo. La ekspozicio havos lokon en salonoj k ĉambroj de la Akademio mem. En ĝi g r a v a n l o k o n o k u p o s speciala f a k o d e e s p - o.

Memkompreneble estas, kian gravan rolon devos ekludi ĉi tiu ekspozicio en la tutmonda prol. unuiĝado per nia komuna neŭtrala lingvo; kiom grave estas montri al la proletaro de USSR k ĝiaj gvidantaj sferoj, i. a. al la Tria Internacio, kian aktualan k efektivan situacion okupis jam nia lingvo en la tutmonda prol. unuiĝado. CK SEU faros ĉion eblan por atingi plej bonan sukceson. Sed la tutm. proletaro devas ĉiel k laŭforte helpi al tiu ĉi gravega afero. Precipe necesas ĉiaspecaj signoj de la intereso de div. nacioj k popoloj (precipe koloniaj) al nia lingvo, kiel al la sola vera k aktuala rimedo por neŭtrala egaliga unuiĝado de l' tutm. proletaro.

Tial CK SEU petas ĉiujn simpatiantojn al la montritaj ideoj sendi s e n p r o k r a s t e k n e p r e al la Kom. Akademio siajn gratulajn leterojn k PK k eblajn ekspozaĵojn (librojn, broŝurojn, ĵurn., folietojn, insignojn, flagojn ktp.), tiel esprimante sian simpation k sukcesdeziron al la ekspozicio. Adr.: USSR, M o s k v o, Volĥonka, Komunista Akademio, al Orgkomitato de la skribad-ekspozicio.

LABORISTA RADIO—NEDERLANDO

La ĉiudimanĉaj dissendoj, kiujn prizorgas la Ned. Federacio de Lab. Espistoj de sendstacio Hilversum, okazas ekde 3. nov. de 9.40—9.55 h. MET. La ondo ŝanĝiĝis. De nun ĝi estas jen 298 m., jen 1071 m. Oni do provu ambaŭ ondojn. Depost 2. junio pas. ni prizorgas la esp. kvaronhoron, kiun ni dividis en du partojn: la unua por propaganda paroladeto pri esp. en nederl. lingvo — la dua por komunikoj en esp-o. Inter ambaŭ partoj sonas la paŭzo-signalo de l' Asocio de Lab. Radio-Amatoroj, nome la tonoj "Leviĝu en mizer' dronanta . . ." el "La Internacio". Dum la esp. parto ofte okazis propagando por SAT k la 9-a kongreso. Dank' al niaj dissendoj multaj kursoj fondiĝis, k tial ni nun uzos nian kvaronhoron por interna laboro: kurso por progresintoj ktp. k esperas povi doni sekvontjare kurson por komencantoj. Zamenhof-vespero (aŭ -mateno) por 14. aŭ 15. dec. estas preparata. Oni subtenu nian penadon skribante simplan PK

kun simpati-esprimo pri niaj dissendoj al VARA, Poŝtkesto 50, Hilversum (Holando). — F. Faulhaber, Marathonweg 15, II, Amsterdam.

Zamenhofa Saĝo

Se ni volas, ke nia afero pli aŭ malpli frue atingu sian celon, ni ne devas atendi iajn grandajn flankajn helpojn, ni ne devas fari iajn kaprompajn saltojn, — la sola afero, kiun ni devas fari, estas, certigi al nia afero regulan senhaltan iradon antaŭen, ne peni fari tro multe per unu fojo, iri malpli rapide, sed regule, kaj antaŭ ĉio por eterne sendanĝerigi nian aferon de ĉia ebla falo aŭ halto. Ni devas uzi niajn fortojn ekonomie kaj saĝe. Se ni per unu fojo volas hele brili, tiam ni baldaŭ laciĝos kaj ni ne sole ne havos la fortojn iri antaŭen, sed la silento post la bruo kaj la mallumo post la lumego estos ankoraŭ tiom pli falanta en la okulojn kaj mortiga por nia afero.

El "La Esperantisto", 1891.

ALVOKO PRI INFANA SEKCIO

Manko de speciala infana sekcio, kiu estu kiel peranto en internaciaj interrilatoj de proleta infanaro, en nuna momento estas tre sentata. Esp-o inter infanaro akiras influon, kreskas internacia korespondado inter infanoj de diversaj landoj, kiu nun iĝas nova ilo de komunisma sennacieca edukado.

Kaj jen, por ke estu peranto, por ke estu gvidanto de tiu ĉi movado, SAT organizas infan-sekcion. Por ke tiu ĉi sekcio sukcesu, ni petas ĉiujn Gek-dojn helpi al ni per alsendo de notoj pri ĉiu infano-esperantisto. Petu la infanojn sendi al ni jenajn notojn por enketo: 1. Nomo k familinomo. 2. Aĝo. 3. Ĉu pioniro aŭ membro de alia infan-organizo? 4. Adreso.

Adreso de la Sekcia Centro: Mitiŝĉi. S. J. D., ul. Koloncova 35, M. Popov, Sovetio.

La movado esp-ista kiel sociologia fenomeno

Laŭ iniciato de esp. ĉelo de Ukrainia Instituto de Marksismo-Leninismo per la klopodoj de K-doj Kuŝnarjov (aspiranto) k Jurinec (profesoro) estos komencata scienc-esploro de l' problemoj "la movado esp-ista kiel sociologia fenomeno" k "la perspektivoj de l' artefarita lingvo internacia". La studrezultoj estos verŝajne publikigataj sub la formo de aparta artikolaro (ukrainlingve) k en la lab. esp. gazetaro.

Ĉiuj K-doj interesataj sin turnu al la adr. de l' Instituto por Marksismo k Leninismo: str. K. Liebknecht 33, Ĥarkov, aldonante supre de l' letero Oseredok Esperanto. K-doj, kiuj posedas materialon utiligeblan por la esplorlaboro (gazetojn, librojn, apartajn artikolojn, bildojn, statistikojn k. s.) bonvolu venigi ilin al la sama adreso.

Dneprano.

Al el- kaj kun-ukrainiaj esp. korespondantoj

Por starigi statistikon k prepari dokumentaron de l' peresp-a korespondado el k al Ukrainio, kiujn ni bezonas por multloke demonstri, la Ukrainia Komitato de SEU tre petas la K-dojn, korespondantajn al Ukrainio, sciigi la liston de lokoj, kun kiuj estas korespondate (t. e. skribi la nomojn de urbo aŭ vilaĝo k distrikto), per poŝtkarto. Ĉiujn K-dojn korespondantajn el Ukrainio, ni same petas sciigi la liston de eksterlandaj lokoj, kun kiuj ili korespondas (urbo aŭ vilaĝo, distrikto aŭ provinco, lando). Ankaŭ al ni ekstersovetiaj K-doj povas venigi korespondopetojn.

Ukrainia Komitato de SEU,

Adr.: Esperanto, Kult. viddil. VURPS, Palac Praci, Ĥarkov, USSR.

Ukrainia Komunist-Infana Estraro por esp-o

La Centra Oficejo Ukr. por kom. infana movado decidis en sia kunsido de 18. 10. akceli la disvolvon de esp. lernado en la grandaj pionir-taĉmentoj, pionir-"bazoj" k -kluboj de Ukrainio. La decido estas sciigata al la distriktaj oficejoj. Kurso estos presata en infanrevuo "Floroj de Oktobro", priesp. artikoloj devos aperi en ĉiuj infangaz. ukrainiaj. La prezidantaro ankaŭ postulos la eldonon de porinfana esp. lernolibro ukrainlingva. Nun la estraro de tiu movado (Centralne Bjuro Kom. Dit. Ruĥu, str. K. Liebknecht 66, Ĥarkov) serĉas interligon kun kom. infan-organizoj ĉiulandaj.

La K-doj zorgu pri represigo de tiu ĉi komuniko en sialanda gazetaro.

Ukr. Kom. SEU.

LIGNAĴISTOJ AL AGADO

K-do 11 746 (en "S-ulo" n-o 261) menciis pri la arbarista terminaro. Ĝuste, mi aldonu, ke pri tiu metio "S-ulo" ĝis nun neniam publikigis ion. Ĉu ekzisto de malforta arbarista movado aŭ foresto de esp. lignaĵistoj en la mondo kulpas en tio? Mi pensas, ke nek tio nek la alio.

Granda terspaco da Sovetia lando estas okupita per arbaro. Centoj da segfabrikoj produktas lignaĵon. La produktado donas al la ŝtato grandan profiton. Centoj da eksterlandaj vaporŝipoj ĉiujare vizitas sovetiajn havenojn por preni eksport-lignaĵon. En ĉefa havenurbo de la nordo, Arĥangelsk, dum la jara ŝipirado oni povas konstante rigardi alvenantajn kaj forirantajn vaporŝipojn de ĉiuj nacioj. Multaj centoj da vaporŝipoj vizitas nin. Ĉirkaŭ la urbo troviĝas pli ol 30 segfabrikoj kun pli ol 20 000 en ili okupitaj laboristoj. Mi ne aludas nun pri arbohakistoj, flosistoj, forstistoj kaj aliaj. En tiuj profesioj ni havas pli ol 100 000 homojn.

Do sufiĉe multe da lignaĵistoj troviĝas nur en unu urbo: Arĥangelsk; sekve tiu industria branĉo same prezentas multnombran movadon.

Vi povas demandi: Ĉu en ĉiuj 30 segfabrikoj ekzistas interligo kun eksterlando, almenaŭ skribe, ĉu ili tenas bonan interligon kun maristoj eksterlandaj, multnombre vizitantaj niajn ruĝanguletojn, ĉambrojn de eksterlandulo ĉe tiuj segejoj? Ho ve, mi devas konfesi, ke ne ekzistas io simila. Jen kial tuta nia soci-aparato, profesiaj, partiaj organizoj nuntempe alarmas. Multaj rezolucioj aperis: urĝe organizi multnombrajn rondetojn, kursojn por ellernado de naciaj lingvoj inter lignaĵistoj, por kiel eble plej bone starigi internacian interligon, bonsukcese priservadi la eksterlandajn gastojn-maristojn.

Interalie mi konfesas kun bedaŭro, ke esp-o ĉi tie ankoraŭ ne estas rigardata kiel bonutila lingvo. Plejmulte pro nesciemo de niaj gvidorganizoj — ne unuvorte oni mencias pri esp-o, eĉ iam kontraŭdiras ĝin. La kaŭzo troviĝas en nia malforto. Laŭ opinio de la poliglotoj kaj erariĝuloj, esp-o ne povas solvi la internacian problemon en kondiĉoj de la nordo, kie superregas arbarproduktado.

Samtempe loka esperantista "Internacia Korespond-Oficejo" aroge supozas, spite ĉio, povi kunligi lokajn ĉelojn de segfabrikoj kun eksterlando kaj krom tio, eĉ ligi ilin per internacia socialisma konkurado. La demando estas aktuala kaj serioza. Se ni neniel sukcesos en nia entrepreno, tiam kontraŭuloj de esp-o (strange estas, sed en USSR troviĝas granda kvanto da ili) triumfos, kaj esp-o en nordo nur vivaĉos.

Ĝis nun ni nenian revokon ricevis al niaj pli ol 20 leteroj, forsenditaj laŭ adresoj de lignaĵistoj en diversajn landojn. Sed ni kredas, ke la SAT-anaro de la tutmondo kunhelpos al ni kunligi la nordan lignaĵistaron kun la sama en eksterlando. Lignaĵistoj de la tutmondo devas en Esperantio okupi sian viclokon, ilia vivo, batalo devas speguliĝi sur la paĝoj de "S-ulo". Aliel ne povas esti. A. Erjuĥin (9682).

TRA LA MOVADO
(Kroniko)

ESTONIO. 15. 10. en la malgranda urbo Pärno, la loka esp. klubo aranĝis kursojn laŭ rekta metodo. Gvidas instruisto de mezlernejo Mälson. Partoprenas **160** laboristoj (metiistoj), kelkaj instruistoj, oficistoj k.a. La kursoj daŭros 40 horojn en du grupoj. Antaŭe estis nur kelkaj esp-istoj ĉi tie. La SAT-movado antaŭenpaŝos ĉe ni. — 10 469 (prezid. de l' loka esperanta klubo). — **FRANCIO. Lyon.** La grupkunvenoj regule estas vizitataj de 20. p. La kursoj estas aktive preparataj. Antaŭe okazas propag. kunvenoj por interesi la laboristojn k instigi al lernado. 10 mil flugfolioj estas disdonataj en leterkestoj. En la gazetoj jam aperis artikoloj; lastmomente ili serioze helpos nin. La agado de la grupo (monsubvenciata de la urbestraro) trovas atenton trans la kadron de la lab. rondoj. Tion pruvas la fakto, ke en publika kunsido de l' urba konsilantaro (18. 8.) okaze de parolado de s-o Reynier (reakciulo) la lab. esp. movado estis laŭde menciata: Tiu deputito rekomendis la kreon de Urba Kurso k "doni sumon de 1200 frk.

al la plej meritplenaj lernantoj, por partopreni al unu el la intern. kongresoj esp-istaj organizataj de la esp. asocioj ĉiujare en div. landoj..." "Mi ne vidas," li daŭrigis, "ion malkonvenan en tio, tute male, ke partoprenu same (en tiu konkurso) la lernantoj de l' liberaj kursoj, inkluzive tiu, diligente sekvata, de la Lab. esp. grupo." Voĉdone tiu propono estis akceptata. Malfermiĝos tia kurso kredeble unuafoje venontjare. — **GERMANIO. Lunzenau.** Post la 9-a Kongreso de SAT vizitis nin 2 K-doj el Ĉeĥoslovakio k 2 K-doj el Svedio. Dank' al ilia propaganda kunhelpo ni povis malfermi nun 2 kursojn por komencantoj kun sume 40 p. (Nia urbo havas nur 5000 loĝ.) Instruata estas laŭ rekta metodo (lernlibro Puff); instruas K-do Kramer. — **SOVETIO. Dnepropetrovsk.** De 1. nov. la regiona komjunula gazeto "Majbutna Zmina" aperigas esp. kurson (adr.: Dnepropetrovsk, Redakcii "M. Z."). La distr. kom. de Komjunularo dissendis al ĉiuj subdistriktaj kom-oj cirkuleron rekomendantan la larĝan lernadon k aplikon de esp-o. Kursoj por eduko de kursgvidantoj estas fondataj ĉe Distr. Kom. Komjunulara k Intersindikata Konsilantaro. **Ĥarkov.** Nova Ukr. Kom. SEU elektita, kies sekretariaro konsistas el K-doj Kuŝnarjov (ĝen. sekr.), D. Pogorelov, E. Izgur. Loka movado vigliĝas. Kursoj en 21-a laborlernejo "Metallist" (gvid. K-dino Ŝtejn), kudrofabriko "Tinjakovka" (K-do Blajko), loĝkomunumo de GPU (K-do Jurĉenko), redakcio de "Ĥarkova Proleto", klubo de "Ligilo" (PTT-istoj), jun. kom. ĉeloj de Ŝtat-Eldonejo k Instituto por Popolklerigo (Pedagogia Superlernejo). Esp. ĉelo fondiĝis ĉe Instituto de Marksismo-Leninismo; partoprenas ĝin kelkaj soveti-famaj marksistaj profesoroj (Jurinec k. a.). La ĉelo starigas marksisman esploradon de l' sociologia signifo de esp. movado k perspektivoj ĝiaj (vidu apartan artik.). Kursoj por eduko de kursgvidantoj ĉe Distr. Intersindik. Konsilantaro k Kom. Komjunulara. En monatrevuo sindikat-kleriga "Kultrabotnik" presiĝis en n-o 19 (okt.) rubriko internaci-eduka kun priesp-aj artik. 26. 10. okazos komjunulara konferenco pri Intern. Eduko; la demando pri esp. lernado pozitive estos pritraktata. La okazinta Ĥarkova Pionirtago (de kom. infanorganizoj) decidis akceli la disvastigon de esp-o inter junpioniroj. Esp-istaro de kom. universitato "Artem" starigas interligon kun studantoj de marksismo ĉiulande. **Kiev.** Laŭ propono de prof. Muziĉenko la sciencesplora Katedro de Pedologio (infanbiologio) akceptis k aprobis starigon en sia metod-sekcio de laboro pri intern. edukado; estos ĉefe pritraktataj la metodiko de intern. ligo peresp-a, metodoj de intern. edukado en lernejo k praktika utiligo de esp-o por la bezonoj de l' scienclaboro de l' Katedro mem. En 43-a laborlernejo fondiĝis modela esp. rondeto (gvid. B. Egers). Kursoj por eduko de kursgvidantoj ĉe Distr. Intersind. Konsil.

Nur tiam vi rajtas paroli pri sukceso, kiam el via kurso rezultas aliĝoj por SAT kaj abonoj por "S-ulo".

TRA LA ESPERANTA GAZETARO

En "Heroldo de Esperanto" oni komencas emfaze tamtami por la venontjara kongreso universala. Tiu temo devos dum 9 monatoj, en plej varia formo kompreneble prezentata, plenigi la titolpaĝon de l' gazeto. "Heroldo" ja estas la sola semajna gazeto en esp-o, kiu servas plej grandparte nur al "verdstelaj" demandoj. Per dikliteraj, grandegaj titoloj eĉ plej bagatelaj k senpostsekvaj okazoj en Esperantio estas sensacie "surtabligataj" al la legantoj, kiuj nepre devas veni al la konkludo, ke morgaŭ esp-o triumfos tutmonde! Sed ni ne forgesu mencii, ke krom la esp. aferoj ankoraŭ unu problemo persiste okupas la paĝojn de "Heroldo", t. e. Paneŭropo. Apud la pac-demandoj oni trovas ja foje ankaŭ tre larĝajn disputartikolojn, en la lastaj n-oj ekzemple inter semido k nesemido pri la "juda nacio". — En "Esperanto"-Genevo (okt.) la redakcio konstatas en komento al artikolo pri "naciismo k mondlingvo" la misuzon de la vortoj "naciismo" k "internaciismo" en senco, kiun logike ili ne havas. Ĝi rekomendas forlasi la kutimajn eluzitajn esprimojn k trovi novan veston por novaj ideoj, kiuj ĝin meritas. Ĝi rekonas la terminon "sennaciismo" kiel esence diferencan de "internaciismo". — "Pola Esperantisto", kiu montras sin ĉiam kiel plej naciema, ofte eĉ ŝovinista gazeto, ankaŭ en okt. n-o ne kaŝas sian nacifieron, parolante pri "Polujo, patrujo de esperanto". — "Amerika Esperantisto", kiu evidente pro la mizera stato de l' esp. neŭtrala movado en Usono ĉiam nur vegetetis, faras novan fortostreĉon. La kajero sept./okt.-a aspektas pli promesplene, k ni legas, ke la Amerika Esp. Kongreso en Novjorko estis favore atentata k priraportata de la Novjorka gazetaro. Tamen mankas al tiu gazeteto ankoraŭ multo, por ke ĝi elpaŝu el la stato de "familia" gazeto al tiu de revuo legata en pli vasta rondo. Pli serioze, konforme al la pli granda movado neŭtrala en Britio, aspektas "International Language", la monata revuo de l' Brita Esp. Asocio. Ĝi enhavas ĉiam literaturan parton k la propaganda parto estas prezentata en alloga (ofte literatura) formo. Tre solidiĝis la dusemajna, bele ilustrita "Espero Katolika" de kiu ĉiam k ĉiam akcentas, ke esp-o por ili nur estas ilo k, por pruvi al siaj legantoj, kiel modele ili devus agi, citas kiel imitindan ekzemplon... SAT k "S-ulo"-n! Ekz. en n-o 67 (1. nov.) la tuta 1½-paĝa ĉefartikolo estas dediĉita al la interna vivo de SAT, kiel ĝi estis ekkonebla el la Protokolaro de l' 9-a Kongreso — certe nur por montri, kiel agas la kontraŭuloj, k kiel devus agi la propraj soldatoj. Cetere la dokumentumo de tiu gazeto pri katolika vivo estas bona. N. B.

MEMORNOTO

Represis el "S-ulo":
L'en dehors, Orléans, n-o 169, Jesuo Barabbas (Lib. Pens. Pĝ.).

Priesper. artik. k notojn enhavis:
N. J. Evening Post, Novjorko, 10. 7.; Signalen, Stokh., 24. 10.; Railway Review, Lond., 20. 9.

Pri SAT-Kongreso raportis:
Daily Worker, Novjorko, 21. 9.

Peresper. materialon enpresis:
Labour News, Novjorko, 21. 9.

NIA POŜTO

10 692. — Mi volonte respondus vian demandon, se... mi povus ĝin kompreni! Verdire mi ne sukcesis decidi, ĉu vi parolas serioze aŭ ŝercas. Mi eĉ emas konjekti, ke vi konfuzas la vortojn "substantivo" k "radiko". Sed estas pli verŝajne, ke mia intelekto ne estas sufiĉe pova k vigla por kompreni viajn subtilajn, sendube transcendajn ideojn. Kompatu min k indulge bonvolu skribi laŭ pli simpla maniero, kiel decas, ke bonedukulo faru eĉ al simpla proleto. E. L.

11 297. — Tiujn mallongajn sciigojn prefere sendu al Esp. Servo. Cetere okazis nemalofte, ĉu en Germanio, ĉu en aliaj landoj, ke la "batantoj" troviĝis en la alia tendaro. Sed vi estas tute prava: batalo devus okazi nur kontraŭ la ekspluatantaro. E. L.

7198. — Vian artikolon kontraŭ "Sinjoro Trocki" ni ne povas enmeti. E. L.

12 721. — Ni ne povas decidi pri enaŭ neenmeto de artikolo, antaŭ ol ni ĝin legis. La ĵus ricevita estas iom tro skema k pli taŭgas por Esp. Servo, al kiu ni ĝin transsendis. E. L.

12 028. — La diroj de Marconi pri aferoj, kiuj ne rilatas lian fakon, estas

SAT-ano
JOHANO ZOLOTIĤ
urbo Lugansk, Poŝtovaja str. 5 (Sovetio)
deziras ricevi (se estas eble) regule **ilustritajn laboristajn ĵurnalojn kaj gazetojn:** franc., germ., angl., uson., belg., sved., japan., norveg. k aliajn **interŝanĝe** kontraŭ rusaj kaj ukrainaj gazetoj kaj ĵurnaloj. Sendu antaŭe la proponojn. Respondo estas garantiata!

Esperanta Rondeto
el membroj de Profesia Sindikato de konstruistoj deziras komenci daŭran korespondadon kun alilandaj esp-istoj-laboristoj pri laborista, socia k popola vivo k moraro, ankaŭ pri nuna stato de lab. organizoj de diversaj landoj. Nepre garant. respondon. **LENINGRAD,** Krjukov kan., 12, **Centra Profesia Klubo de konstr. je la nomo de Tomski.**

Esperanta Ĉelo de Moskva Supera Teknika Lernejo
deziras korespondi kun proleta Studentaro el tuta mondo, kun kolektivoj k individuoj. Temo: studenta vivo en politika, lerna, vivkondiĉa k. a. sencoj. Klarigo: Nia lernejo havas jenajn fakultatojn: 1. elektroteknikan, 2. meĥanikan, 3. ĥemian, 4. konstruan k preparas inĝenierojn. — Studentnombro: 7300
Nia adreso: USSR, Moskvo 5, Voznesenskaja 20, kv. 2, al A. Rusakov.

senvaloraj; tial ni ne publikigos vian artikolon. E. L.

13 794. — Jes, ni uzos vian materialon por "L. L.". Sed ni rimarkigu, ke ni jam nun posedas grandan kvanton da enigmoj ktp.; sekve nur iom post iom ni povos aperigi.

G. Poth. — 1. Via versaĵo estas tro longa por "S-ulo", cetere oni povus laŭ la enhavo multe pli koncize esprimi la samon; 2. la versoj estas kriplaj k lamas, sekve ne estas presindaj.

2474. — Via laste sendita artik. en tiu ĉi formo jam malaktualiĝis, sekve ne plu estas uzebla por nia gaz.

15 160. — Ni ne povas enmeti senpage vian anoncon. Cetere via supozo ĝustas.

10 411. — Via artik. aperos en unu el venontaj n-oj.

K-doj J. S. Rutweld Sumdr. (Holando) estas petata konigi sian precizan adreson al la Red.; letero sendita revenis pro nesufiĉe kompleta adreso.

Red.

K * O * R * E * S * P * O * N * D * A * D * O

Unu enpreso: Simpla trilinia anonco kostas 0,80 mk. g., ĉiu plia linio 0,50 mk. Ni nur akceptas anoncojn kun samtempa pago.
L = letero, PK = poŝtkarto, PI = poŝtkartoj ilustritaj, PM = poŝtmarkoj, bfl. = poŝtmarko sur bildflanko, kĉl. = kun ĉiuj landoj, esp-aĵo = esperantaĵo.
Ĉiuj petantoj pri korespondado havas la devon, nepre respondi almenaŭ unu fojon al ĉiuj petoj koncernantaj la fakon, por kiu ili sin enskribigis.

AŬSTRIO

Adresŝanĝo. — K-do Tomas Pavlik (6843), Kirchstetterng. 44-3-24, Wien XVI.

BELGIO

K-do Ad. Houben, Kemmelberg, 3, Berchem-Antwerpen, interŝ. PM per 100 aŭ 200 specoj, ankaŭ PK, bfl.

BRITIO

— Juna arĥitektura desegnisto dez. koresp. kun samfakuloj. Interŝ. gazetojn ktp. Adr.: A. C. Shepherd, Reid St. 43, Dunfermline, Skotlando.

K-doj en Rusio! — Mi dez. seriozan koresp-adon pri ekonomio, enlanda vivo ktp. Skribu al: K-do R. Rossetti, High St. 111, Dunfermline, Skotlando.

Adresŝanĝo. — K-do W. C. Coghlan, 88 East India Dock Road, Poplar, London E. 14 (antaŭe Canning Town), dez. koresp., precipe kun maristoj, sovetianoj k pri mia naskiĝlando Aŭstralio, interŝ. L, PK, il. ĵurnalojn.

BULGARIO

K-do T. N. Hristovski, vil. Radotina, Orĥane, dez. koresp. pri ĉ. t., kĉl., L, PI. Resp. garantiata.

FINNLANDO

K-do Ensio Laine, Abrahamink, 15, B. 19, Helsinki, vendas, aĉetas k interŝ. ĉiuspecajn PM. El Germanio nur pli bonajn specimenojn. Evert katalogo.

FRANCIO

K-do F. Coadou, Blérancourt, Aisne, dez. koresp. kĉl.

GERMANIO

K-do Heinrich Peter, Am Brennhaus 17-a, Ffm.-Griesheim, dez. koresp. pri div. temoj kĉl.

K-do Emil Schmidt, Burgstr. 56, Oberursel i. Taunus (21 j., sportulo), dez. koresp. kun samaĝuloj el ĉl.

K-do Heinrich Lörcher, Rüsselsheimer Str. 15, Frankfurt a. M., dez. koresp. kĉl. pri ĉ. temoj.

K-do Paul Kromath, Heimatring 21, Frankfurt a. M.-Süd. dez. koresp. kĉl. pri ĉ. temoj.

K-do Alfred Hartelt, Paulstr. 43, Breslau-9, interŝ. PM kĉl. Resp. garantiata.

K-do Walter Westphal, Gerberbruch 20, Rostock, dez. koresp. kĉl., L, PI, PM, precipe kun franciaj K-doj. Certe resp.

— Juna K-dino dez. koresp. kĉl. Certe resp. Adr.: Hanni Lessig, Elisenstr. 34, Altenburg i. Th.

K-do Konrad Bernthaler, Horster Str. 496-a, Bottrop i. W., dez. koresp. kĉl., L, PI, bfl. Resp. garant.

JARABONO
por membroj . . . 8 mk. g.
por nemembroj . . 9 mk. g.
Ankaŭ ¼-jare abonebla!

Atentu Gek-doj! — La proleta kulturorganizo "IFA" intencas aranĝi esp. kursojn por la ĉi tieaj lab-istoj. Bonvolu sendi tuj instigleterojn aŭ PK al K-do Kasimir Sublimer, Victoriastr. 97, Breslau.

— En Francio mi serĉas laboron de aprilo 1930 ĝis marto 1931 por spertiĝi k kunhelpi en la movado. Skribu por "MFM" al Adm. de SAT.

Filatelistoj! — Sendu 25 aŭ pli PM, mi resendas duoblan kvanton. Adr.: Herbert Zielaskowski, Dürerstr. 44, Königsberg i. Pr.

K-do H. Hahn, Salzburghofen 64 b. Freilassing (Bavario), dez. koresp. kĉl., PI.

K-do Franz Opermann, Kieler Str. 21, Nordhorn i. Hann., dez. koresp. kĉl. PI, bfl.

HUNGARIO

K-do Stefano Kellner, Balvány — u. 22, Budapest, V., dez. koresp., precipe pri labor-kondiĉoj kun holandaj K-doj.

Kiu volas havi
interesan kolektivan korespondadon pri demandoj:
1. Sporto
2. Radio-amatoreco
3. Junkom. movado
4. Labkoreco
5. Foto-amatoreco
6. Sendiuleco
7. IRH-movado
8. Virina movado
ankaŭ interŝanĝi per koncernaj aĵoj **?**

Senprokraste skribu laŭ adreso: Sovetio, Leningrad, Nab. Roŝal, 8, LSPO, Mestkom.

SOVETIO

K-do A. Babinĉuk (stablokonstruisto), Budjenogo 40, Odessa, dez. koresp. kun Anglio, Francio k Danio pri lab. k politik. temoj.

K-do Elio Boĵkov, Ĉernjaevskaja ul. 14, Rostov/Don, kun gelernantoj k gejunkom-istoj de ĉl. L, PK. Resp. gar.

— Gestudentoj de medicina fako dez. koresp. kĉl. samfakanoj pri lernmetodoj k vivkondiĉoj de studentoj. Adr.: Rostov/Don, Medfak de Gosuniversiteta, red. stangaz "Puls".

— Pionira taĉmento ĉe Sindikato de artlaboruloj dez. koresp. kun pioniraj organizoj k kun lernantoj pri infana vivo k sperto de organiza laboro. Adr.: Rostov/Don, ul. Engelsa, Sojuz Rabis'a dla pioner. otr.

K-do Timoteo Tarabrin, Klinskaja 71, Stalingrad, dez. koresp. kĉl., pri div. temoj.

K-do Teodoro Djakov (24 j.), studento en 2-a Gos. Universiteto, Deviĉje pole, Moskvo, kun Gek-doj ĉl., L, PI, gaz., precipe pri socia vivo, revolucia movado.

K-do N. F. Bujanov, Krasnojarskaja ul. 19, Novosibirsk, Siberio, dez. koresp. kĉl., L, PK, PI pri div. temoj, interŝ. papermonon. Nepre resp.

INĜENIERO-MEĤANIKISTO
de ŝipkonstrua fabriko deziras korespondi kun inĝenieroj samfakulaj pri profesiaj temoj.
Adreso: Sebastopol, Krim, ul. Franze, 30, Labesko, por G. Trofimov.

ENHAVO:

	pago
Resumoj el la libro "Standards" (Normoj)	73—74
Intelektulo? — Manlaboristo?	74
Okaze de princa gefianĉiĝo	75
La projekto de la Transsahara fervojo	75—76
IFA: Interesunuiĝo por laborista kulturo	76
Malsatstriko de politikaj enkarcerigitoj en Hungario	76—77
Mersina	76—77
Sciencaj esploroj en arkta lando	77—78
Kelkaj faktoj pri Hindio	78
Ekonomiaj notoj	78
El usona taglibro	78
Sennaciula Edukista Paĝo	79
Esperanto-Servo	80
Tra Esperantio	81—84
Anoncoj, Korespondado	83—84

Presejo: Peuvag. Druckerei-Filiale Leipzig (Germanio)